La kortegano ĉe la verdeta brilo de la luno pririgardis lian piedon.

— Danku al Oziris — li diris — ke ne araneo, kies veneno en ĉi tiu horo estas mortiga.

Ho! kiel vanajestas la homaj esperoj kontraŭ la ne retireblaj verdiktoj...

En ĉi tiu momento eniris la armeestro kaj, klinsalutinte Horuson, li diris:

— La granda Ramzes, sentante, ke lia korpo jam malvarmiĝas, sendis min al vi ordonante: "Iru al Horus, ĉar mi ne longe jam estos en la mondo, kaj plenumadu lian volon, kiel vi plenumadis la mian. Eĉ se li volus cedi Egipton Supran al la Etiopoj kaj kun tiuj malamikoj ligi fratan alliancon, plenumu tion, kiam vi vidos mian ringon sur lia mano; ĉar per la buŝo de la regantoj parolas la senmorta Oziris."

— Mi ne fordonos Egipton al la Etiopoj — diris la princo — sed mi faros pacon, ĉar domaĝas al mi la sango de mia popolo; tuj skribu edikton kaj pretigu aron da rajdaj kurieroj, por ke ili, kiam ekbrilos la unuaj fajroj je mia honoro, ekrajdu en la direkto de la suda suno kaj sciigu al la Etiopoj mian pardonon. Kaj skribu ankoraŭ duan edikton, ke komence de nun ĝis la fino de la tempoj el la buŝo de neniu milit-kaptito oni elsiru la langon sur la batalkampo. Tiel mi parolis.

La armeestro falis sur la vizaĝon kaj reiris, por skribi la ordonojn; kaj la princo ordonis al la kortegano refoje pririgardi lian vundon, ĉar ĝi tre doloris al li.

— Iom ŝvelis via piedo, Horus — diris la kortegano. — Kio estus, se anstataŭ abelo estus araneo vin mordinta!...

Nun eniris la aŭlon la regna kanceliero kaj, klinsalutinte la princon, diris:

— La potenca Ramzes, vidante, ke lia okulo malklariĝas, sendis min al vi ordonante: "Iru al Horus kaj plenumadu blinde lian volon. Se li eĉ ordonus senkatenigi la sklavojn, kaj donaci al la popolo la tutan teron, vi faru tion, kiam vi ekvidos sur lia mano mian sanktan ringon, ĉar per la buŝo de la regantoj parolas la senmorta Oziris."

— Tiajn intencojn mi ne havas — diris Horus. Sed tuj skribu edikton, ke oni malaltigas al la popolo la farmo-pagojn kaj impostojn je duono kaj la sklavoj havas en semajno tri tagojn liberajn de laboro kaj sen juĝa verdikto oni ne bastonados iliajn dorsojn. Skribu ankaŭ edikton, revokantan el la ekzilo mian instruiston Jetron'on, kiu estas la plej saĝa kaj plej nobla el la Egiptanoj. Tiel mi parolis.

La kanceliero falis sur la vizaĝon, sed antaŭ ol li povis reiĝi, por skribi la ediktojn, eniris la ĉefpastro.

— Horus, — li diris — baldaŭ la granda Ramzes foriros en la regnon de ombroj, kaj Oziris pesos lian koron sur la ne erarema pestelero. Kaj kiam la sankta ringo faraona ekbrilos sur via mano, ordonu, kaj mi vin obeos, eĉ se vi volus faligi la miraklan sanktejon de Amon, ĉar per la buŝo de la regantoj parolas la senmorta Oziris.

Mi ne detruos — rediris Horus — sed mi konstruos novajn sanktejojn kaj pliriĉigos la pastran trezorejon. Mi nur postulas, ke vi skribu edikton pri solena transporto de la korpo de mia patrino Zeforo en la katakomboj kaj duan edikton.. pri la liberigo de l' amata Bereniko el la monaheja malliberejo. Tiel mi parolis.

— Vi saĝe komencas — rediris la ĉefpastro. — Por plenumi ĉi tiujn ordonojn, ĉio jam estas preta, kaj la ediktojn mi tuj skribos, kiam vi ilin tuŝos per la ringo faraona, mi lumigos ĉi tiun lampon, por ke ĝi anoncu al la popolo bonfarojn, kaj al via Bereniko liberecon kaj amon.

Eniris la plej saĝa kuracisto el Karnak.

— Horus — li diris, — ne mirigas min via paleco, ĉar Ramzes, via avo, jam agonias. Tiu potenculo super potenculuj ne povis elteni la fortecon de la kuracilo, kiun mi ne volis al li doni. Do restis ĉe li nur la anstataŭanto de la ĉefpastro, por depreni, kiam li mortos, la sanktan ringon de lia mano kaj ĝin al vi transdoni por signo de senlima regpovo. Sed vi pli kaj pli multe paliĝas, Horus? — li aldonis.

— Pririgardu mian piedon — ekĝemis Horus kaj malleviĝis sur oran seĝon, kies apogilo estis skulptita laŭ la formo de akcipitraj kapoj.

La kuracisto ekgenuis, pririgardis la piedon kaj, terurite, malantaŭeniĝis.

— Horus — li ekflustris — vin mordis tre venena araneo.

— Ĉu... mi devus morti?... en tia momento? ... — demandis Horus per apenaŭ audebla voĉo.

Kaj poste li aldonis:

— Ĉu rapide tio okazos?... diru la veron...

— Antaŭ ol la luno kašiĝos post tiu palmo...

— Ah, jes!... Kaj ĉu Ramzes ankoraŭ longe vivos?...

— Ĉu mi scias?... Eble oni jam portas al vi lian ringon.

En tiu momento eniris la ministroj kun la pretaj ediktoj.

— Kanceliero! — ekkriis Horus, kaptante lin je la mano — ĉu, se mi tuj mortus, vi plenumus miajn ordonojn?

— Atingu, Horus, la aĝon de via avo! — respondis la kanceliero. — Sed, se vi eĉ tuj post li ekstarus antaŭ la juĝo de Oziris, ĉiu via edikto estos plenumita, se vi nur tuŝos ĝin per la sankta ringo faraona.

— Ringo! — ripetis Horus — sed kie ĝi estas?

— Diris al mi kortegano — ekflustris la ĉefa armeestro — ke la granda Ramzes jam spiras lastajn spirojn.

— Mi sendis al mia anstataŭanto — aldonis la ĉefpastro — ke tuj, kiam la koro de Ramzes ĉesos frapi, li deprenu la ringon.

— Mi dankas al vi!... — diris Horus — Mi bedaŭras... ah, kiel mi bedaŭras... Sed ja ne tuta mi mortos... Restos post mi benoj, trankvilo, la feliĉo de la popolo, kaj... mia Bereniko rericevos la liberecon... Ĉu longe ankoraŭ?... — li demandis la kuraciston.

— La morto estas proksima de vi mil paŝojn da soldata iro — respondis malgaje la kuracisto.

— Ĉu vi ne aŭdas?... ĉu neniu iras el tie?... — diris Horus.

Silento.

La luno proksimiĝis al la palmo kaj jam puŝis ĝiajn unuajn foliojn; pulvorigita sablo mallaŭte murmuretis en la klepsidroj.

— Malproksime?... — ekflustris Horus.

— Okcent paŝojn — respondis la kuracisto —

mi ne scias, Horus, ĉu vi povos tuŝi ĉiujn ediktojn per la sankta ringo, eĉ se oni ĝin al vi tuj alportos.

— Donu al mi la ediktojn — diris la princo, atente aŭskultante, ĉu ne kuras iu el la ĉambroj de Ramzes. — Kaj vi, pastro — li turnis sin al la kuracisto — diru, kiom da vivo restos al mi, por ke mi povu sankcii almenaŭ la por mi plej karajn ordonojn.

— Ŝescent paŝoj — ekflustris la kuracisto.

La edikto pri malpliigo de farmopagoj por la popolo kaj de la laboro por la sklavoj elfalis el la manoj de Horus sur la teron.

— Kvincent...

La edikto pri la paco kun la Etiopoj deŝviĝis de la genuoj de la princo.

— Ĉu ne iras iu?...

— Kvarcent... — rediris la kuracisto.

Horus profundiĝis en pensojn, kaj malsuprenfalis la edikto pri transporto de la korpo de Zeforo.

— Tricent...

La sama sorto trafis la edikton pri revoko de Jetron el la ekzilo.

La buŝo de Horus bluiĝis. Per kuntirita mano li jetis teren la edikton pri neelŝirado de la langoj de militkaptitoj, kaj lasis nur... la ordonon pri liberigo de Bereniko.

— Cent...

Ĉe tomba mallaŭto oni ekaŭdis frapon de sandaloj. En la aŭlon enkuris la anstataŭanto de la ĉefpastro. Horus etendis la manon.

— Miraklo!... — ekkriis la veninto. — La granda Ramzes rericevis la sanon... Li leviĝis vigle el la lito kaj li volas je sunleviĝo ekiri por ĉasi je leonoj... Kaj, vin, Horus, por signo de favoro, li invitas, ke vi lin akompanu...

Horus ekrigardis per estingiĝanta okulo trans la Nilon, kie brilis lumo en la malliberejo de Bereniko, kaj du larmoj, sangaj larmoj, ruliĝis de lia vizaĝo.

— Vi ne respondas, Horus?... — demandis mirigite la sendito de Ramzes.

— Ĉu vi ne vidas, ke li mortis? — ekflustris la plej saĝa kuracisto el Karnak.

Vidu do, ke vanaj estas la homaj esperoj kontraŭ la verdiktoj, kiujn la Eternulo skribas per fajraj signoj sur la ĉielo...

El la pola: *G. Belbart.*

LA AMO ESTAS DOLĈA TURMENTO.

De Ivan Št. Andrejĉin.
El la "Bulgara antologio"

Ĉu ne estas tiel?

Certe; nur tiu, kiu jam amis, povas ĉi tion scii.

Sed kiu ne amis jam almenaŭ unufoje dum sia vivo?

Mi volas diri: kiu ne suferis jam?

Ĉar am estas suferi kaj terure suferi. Ĉio estas tiel farita, tiel ordigita, tiel kombinita, ke ĝi suferigu la malfeliĉulon, kiu ŝarĝiĝis per la kruco de l'amo.

Kaj ii volonte portas tiun ĉi krucon; nenia kruco estas tiel peza, sed tial neniun oni portas tiel volonte.

Ami — tio ne estas laŭ via volo. La sorto, la providenco, la ĉielo, la senfineco... iu el ili sendas al ni tiun ĉi krucon. Kaj ni devas ĝin meti sur dorson, ni devas ĝin porti.

Kaj ni ne povas indigni. Ni kurbiĝas sub ĝia pezo, ni falas, relevigas kaj refalas... ŝvito falas je nia frunto, ni silentas. Senfinan ĉagrenon, senfinan malĝojon — ni toleras. Nia koro fandiĝas, kurbiĝas, tremas — ofte en agonio, sed karaj estas al ni tiuj ĉi ĉagrenoj. Maldolĉaj kiel absinto, furiozaj kiel veneno, sed ili disversas senfinan dolĉecon sur tutan nian ekzistajon...

Senfina dolĉeco... sed kare ĝi kostas! Per la kosto de nia sango — sangero post sangero elfiltriĝas el niaj vejnoj, — ni paliĝas, malfortiĝas, fandiĝas kiel roso antaŭ suno, malaperas kiel maldensaj someraj nuboj... Kaj ĉio nur por tiu ĉi senfina dolĉeco! Senfina, sed ĝi daŭras nur dum kelkaj palpebrumoj...

Kelkaj palpebrumoj de okulo por tuta suko el niaj vejnoj!... Kiel kare...

Sed tie ĉi la avareco kaj la pento ne estas kontaj. Vi vidas, ke ĉion vi donas, vi konscias, ke tre kare kostas al vi tiuj ĉi malmultaj palpebrumoj. — Sed vi ne retiras la manon, kaj vian vizaĝon vi ne deturnas, vi ne envias la donaciton ĉe tiu ĉi interŝanĝo kaj vi estas preta pli multe doni...

Sed tio ĉi ne estas necesa, ĉar nenio restas por vi.

Ho, jes — ne estas pli peza kruco ol la kruco de l'amo!

Vi falas sub ĝia pezo kaj suferas infere antaŭ la sola penso, ke oni povas ĝin preni de vi!

Vi malfermas vian koron por ke elfluu la sango, kiu vin estingas kiel finbruliĝantan kandelon kaj vi timas, ke iu ne ĉesigu la fluadon de l'sango enmetante oleon en la estingiĝantan kandelingon! Kia grandega sinrifuzo!

Ho, amo! La mondo ankoraŭ ne diris sian lastan vorton pri vi. Multo estis parolita, multo estis skribita pri vi: de l'oriento kaj okcidento, de nordo kaj sudo, de komenco de la vivo ĝis nun disportiĝis kaj disportiĝas la ĝemspiroj de tiuj, kiuj portas vian pezan krucon.

Tiel estis en komenco — kiun neniu memoras — kaj tiel estos ĝis la fino — kiun neniu ĝisatendos.

Sed super ĉio ĝis nun dirita, pri vi oni renkontas nur unu vorton: „turmento", ĉiam akompanata de alia: „dolĉa".

Ĉu estas alia pli esprima, pli mallonga kaj pli klara difino ol ĉi tiu: La amo estas dolĉa turmento?

Tradukis Ivan H. Krestanov.

LA REVENO.

De Guy De Maupassant.
El "Literatura mondo"

La maro vipas la bordon per mallongaj kaj monotonaj ondoj. Simile al birdoj, blankaj nubetoj pasas rapide tra la granda blua ĉielo, forblovitaj de rapida vento; kaj la vilaĝo varmiĝas sub la suno, en faldo de valeto deklivanta al la oceano.

Guste je la enirejo staras la domo de la "Martin-Levesque", sola, sur la flanko de la vojo. Ĉi estas malgranda fiŝkaptista loĝejo kun argilaj muroj kaj kun pajla tegmento ornamita per bluaj iridoj. Gardeno apenaŭ pli larĝa ol poŝtuko, en kiu

kreskas bulboj, kelkaj brasikoj, petroselo, cerefolio, sin sternas antaŭ la pordo. Dornobarilo ĉirkaŭbaras ĝin laŭlonge de l' vojo.

La edzo iris fiŝkapti kaj la edzino riparas antaŭ la domo la mašojn de granda bruna reto, etendita kvazaŭ grandega araneajo sur la muro. Ĉe la enirejo de la ĝardeno sidas dekkvarjara knabino sur pajla seĝo malantaŭklinita kaj dorse apogita al la barilo, kaj ŝi rebonigas malriĉulajn subvestajojn, pecflikitajn, jam kudroriparitajn. Alia knabino, unu jaron pli juna, lulas inter siaj brakoj infanon tute etan, ankoraŭ sengestan kaj senparolan, kaj du buboj du- kaj trijaraj kun la postajoj en la tero, nazo ĉe nazo, ĝardenas per siaj mallertaj manoj kaj jetas unu al alia plenmanojn da polvo en la vizaĝon.

Neniu parolas. Nur la knabeto, kiun oni provas dormigi, ploras senĉese per akra kaj malforta voĉo. Kato dormas sur la fenestra sojlo kaj ekflorintaj levkojoj formas piede de la muro belan kuseneton el blankaj floroj, sur kiu zumas muša popolo.

La knabino kiu kudras apud la enirejo subite vokas:

— Patrino!

La patrino respondas:

— Kio estas?

— Jen li ree.

Ambaŭ estas malkvietaj jam de mateno, ĉar viro vagas spionante ĉirkaŭ la domo; li estas maljunulo, laŭ la šajno almozulo. Ili ekvidis lin unue kiam ili iris akompani la patron al la šipo. Li sidis sur la fosajo antaŭ ilia pordo. Poste, kiam ili revenis el la marbordo, ili retrovis lin samloke rigardantan la domon.

Li šajnis malsana kaj tre mizera. Dum pli ol unu horo li ne foriris, poste, vidante, ke oni opinias lin kvazaŭ malbonulo, li starigis kaj foriris per malfacilaj pašoj.

Sed baldaŭ ili vidis lin reveni kun lia malrapida kaj laca marŝado kaj li denove sidiĝis, ĉi tiun fojon iom pli proksime, kvazaŭ por kašobservi ilin.

La patrino kaj la knabinoj timis. La patrino precipe maltrankviliĝis, ĉar ŝi estis timema, kaj ĉar ŝia edzo, **Levesque,** devus reveni el la maro nur je la vesperiĝo.

Ŝia edzo estis nomata Levesque, ŝin oni nomis Martin kaj ilin kune oni nomis "la Martin-Levesque". Jen kial: ŝi edziniĝis la unuan fojon al ŝipano, nomita Martin, kiu iris ĉiusomere al Tero Nova por kapti moruojn.

Post dujara edziĝo ŝi naskis filinon kaj ŝi estis ankoraŭ graveda je ses monatoj, kiam la ŝipo kiu surhavis sian edzon, la **Deux-Soeurs,** trimasta barko el **Dieppe,** malaperis.

Neniam oni ricevis ian sciigon pri ĝi; neniu maristo revenis; oni do rigardis ĝin kiel perditan kun ĉiuj vivoj kaj havoj.

"La Martin" atendis sian edzon dum dek jaroj, penege edukante siajn du infanojn; poste, ĉar ŝi estis laborema kaj bona virino, regiona fiŝkaptisto, **Levesque,** vidvo kun unu knabo, petis, ke ŝi fariĝu lia edzino. Ŝi edziniĝis kun li kaj havis ankoraŭ de li du infanojn en la daŭro de tri jaroj.

Ili vivis pene, malfacile. Pano estis kara kaj viandon preskaŭ nekonata en la domo. Oni šuldiĝis kelkfoje ĉe la panisto, vintre, dum la ventegaj monatoj. Tamen la etuloj bone fartis. Oni diris:

— Ŝtas honestuloj tiuj **Martin-Levesque.** "La Martin" forte laboras, kaj ne ekzistas homo komparebla al Levesque en fiŝkaptado.

La knabino sidanta kontraŭ la barilo diris denove:

— Šajnas, ke li konas nin. Eble li estas almozulo el **Epreville** aŭ **Auzebosc.**

Sed la patrino ne kredis tion. Ne, ne, li ne estis iu el la regiono, certe!

Ĉar li sidis senmove, kvazaŭ fosto kaj ĉar li obstine fiksis siajn okulojn al la loĝejo de la **Martin-Levesque,** "la Martin" furioziĝis kaj kuraĝigite de timo, ŝi ekkaptis šovelilon kaj eliris antaŭ la pordon.

— Kion vi faras tie? — ŝi kriis al la vagulo.

Li respondis per raŭka voĉo:

— Mi spiras la freŝan aeron, nu! Ĉu mi malutilas al vi?

Ŝi rediris:

— Kial vi estas kvazaŭ spionanta antaŭ mia domo?

La viro rebatis:

— Mi malutilas neniun. Ĉu estus malpermesite sidi sur la vojo?

Trovinte nenion por respondi, ŝi reeniris hejmen.

La tago forfluis malrapide. Ĉirkaŭ tagmezo la viro malaperis. Sed li ree trapasis ĉirkaŭ la kvina. Oni ne plu vidis lin dum la vespero.

Levesque revenis kiam jam noktiĝis. Oni rakontis al li la okazintajon. Li konkludis:

— Ŝtas iu scivolulo aŭ maliculo.

Kaj li kušiĝis sen maltrankvilo, dum sia kunulino revis pri tiu vagulo, kiu rigardis ŝin per tiel strangaj okuloj.

Je tagiĝo ventegis kaj la fiŝkaptisto, vidante, ke li ne povas iri al la maro, helpis al sia edzino ripari la retojn.

Ĉirkaŭ la naŭa, la plejaĝa filino, unu Martin, kiu iris serĉi panon, revenis kurante kun konfuza vizaĝo kaj kriis:

— Patrino, jen li ree!

La patrino emociiĝis kaj tute pale diris al sia edzo:

— Iru paroli kun li, **Levesque,** por ke li ne kašobservu nin tiel, ĉar tio min incitegas.

Kaj **Levesque,** granda maristo kun brikkolora vizaĝo, kun densa kaj ruĝa barbo, bluaj okuloj truitaj de nigra punkto kaj fortika kolo, ĉiam vestita per lano pro timo al la vento kaj pluvo plenmara, eliris trankvile kaj proksimiĝis al la vagulo.

Kaj ili ekparolis.

La patrino kaj la infanoj rigardis ilin de malproksime, angore kaj tremetante.

Subite la nekonatulo stariĝis kaj venis kun **Levesque** al la domo.

"La Martin", konsternite, pašis malantaŭen. Ŝia edzo diris al ŝi:

— Donu al li iom da pano kaj glason da pomvino. Li nenion manĝis de antaŭhieraŭ.

Kaj ili eniris ambaŭ en la loĝejon, sekvataj de la virino kaj de la infanoj. La vagulo sidiĝis kaj ekmanĝis, la kapon klininte sub la rigardoj de ĉiuj.

La patrino staranta fikse rigardis al li en la vizaĝon; la du filinoj, el kiuj unu portis la lastan infanon, dorsapogitaj kontraŭ la pordo, direktis al

li siajn avidajn okulojn kaj la du infanoj, sidantaj en la kamena cindro, ĉesis ludi kun la nigra bolkaldrono, kvazaŭ por rigardadi ankaŭ tiun fremdulon.

Levesque eksidinte demandis al li:

— Nu, ĉu vi venas de malproksime?

— Mi venas el **Cette.**

— Piede? tiel?

— Jes, piede. Se oni ne havas monon, kion fari?

— Kien vi nun iras?

— Mi venis tien ĉi.

— Ĉu vi do konas iun ĉi tie?

— Povas esti.

Ili silentis. Li manĝis malrapide, kvankam malsatega, kaj li trinkis gluton da pomvino post ĉiu panbuŝpreno. Li havis eluzitan, sulkan, ĉie kavan vizaĝon kaj ŝajnis multe suferinta.

Levesque demandis lin abrupte:

— Kiel vi nomiĝas?

Li respondis ne levante la nazon:

— Mi nomiĝas Martin.

Stranga tremeto skuis la patrinon. Ŝi faris unu paŝon, kvazaŭ por vidi pli proksime la vagulon kaj restis antaŭ li kun pendantaj brakoj, kun buŝo malfermita. Neniu diris ion pli. **Levesque** fine ekparolis.

— Ĉu vi estas el ĉi tie?

Li respondis:

— Mi estas el ĉi tie.

Kaj dum li levis fine la kapon, la rigardo de la virino kaj la lia renkontiĝis kaj restis fiksaj, miksitaj, kvazaŭ ili estus alkroĉitaj unu al la alia.

Kaj ŝi ekparolis subite, per ŝanĝita, mallaŭta, tremanta voĉo:

— Ĉu estas ci, mia edzo?

Li malrapide diris:

— Jes, estas mi.

Li ne moviĝis kaj daŭrigis maĉi sian panon. **Levesque** pli surprizita ol emociita, balbutis:

— Ĉu estas ci, Martin?

La alia diris simple:

— Jes, estas mi.

Kaj la dua edzo demandis:

— De kie do ci venas?

La unua rakontis:

— El la Afrika marbordo. Nia ŝipo dronis sur sablajo. Ni forsaviĝis triope: Picard, Vatinel kaj mi. Kaj poste ni estis kaptitaj de sovaĝuloj, kiuj retenis nin dekdu jarojn. Picard kaj Vatinel mortis. Estis angla vojaĝisto, kiu kunprenis min preterpasante kaj kondukis min al **Cette.** Kaj jen mi estas.

"La Martin" ekploris, kun vizaĝo en sia antaŭtuko.

Levesque diris:

— Kion ni faros nun?

Martin demandis:

— Ĉu estas ci, kiu estas ŝia edzo?

Levesque respondis:

— Jes, estas mi!

Ili rigardis unu la alian kaj silentis. Tiam **Martin,** konsiderante la infanojn ronde ĉirkaŭ li, montris per kapsigno la du knabinojn.

— Ĉu estas la miaj?

Levesque diris:

— Estas la ciaj.

Li ne starigis, li ne kisis ilin, li nur konstatis:

— Dio bona, kiel grandkreskaj ili estas!

Levesque ripetis:

— Kion ni faros?

Martin, konfuza, ankaŭ ne sciis. Fine li decidiĝis:

— Mi, mi faros laŭ cia deziro. Mi ne volas fari al ci domaĝon. Estas tamen malhelpo pro la domo. Mi havas du infanojn, ci havas tri; ĉiu la siajn. Pri la patrino: ĉu ŝi estas la cia, ĉu ŝi estas la mia? Mi konsentas kio plaĉos al ci; sed la domo estas la mia, ĉar mia patro postlasis ĝin al mi, mi naskiĝis en ĝi kaj ni havas paperojn ĉe la notario.

"La Martin" ĉiam ploris per singultetoj kaŝitaj en la blua tolo de la antaŭtuko. La du grandaj knabinoj estis pliproksimiĝintaj kaj rigardis maltrankvile sian patron.

Li finis manĝi. Siavice li diris:

— Kion ni faros?

Levesque havis ideon.

— Ni iru al la pastro, li decidos.

Martin starigis kaj kiam li iris al sia edzino, ŝi jetis sin sur lian bruston singultante:

— Mia edzo! jen ci estas! **Martin** mia kompatinda **Martin,** jen ci estas!

Kaj ŝi tenis lin plenbrake, subite trairita de iama sento per granda skuo de rememoroj, kiuj reportis al ŝi ŝian dudekjarecon kaj ŝiajn unuajn ĉirkaŭprenojn. **Martin,** ankaŭ emociita, kisis ŝin sur ŝia kufo. La du infanoj en la kameno ekkriegis, aŭdante kune plori sian patrinon, kaj la lastenaskita, inter la brakoj de la dua knabino Martin, kriis per voĉo akra, kiel malĝusta fajfilo.

Levesque, starante, atendis:

— Ni iru, li diris, necesas leĝe reguligi nian situacion.

Martin delasis sian edzinon kaj, ĉar li rigardis siajn du filinojn, la patrino diris al ili:

— Kisu vian patron, almenaŭ.

Ili samtempe alproksimiĝis kun okuloj sekaj, mirante, iom timeme. Kaj li kisis ilin unu post la alia sur ambaŭ vangoj per dika kamparana kiso. Vidante alproksimiĝi tiun nekonatulon, la infaneto eligis tiel akrajn kriojn, ke li havis preskaŭ konvulsiojn.

Poste la du viroj eliris kune.

Pasante antaŭ la "Kafejo de l' Komerco" **Levesque** demandis:

— Ĉu ni unue ne trinkus glaseton?

— Mi, mi konsentas, — deklaris Martin.

Ili eniris, sidiĝis en la ankoraŭ malplena ĉambro kaj **Levesque** kriis:

— He! **Chicot,** du glasojn da brando, el la bona. Martin revenis, Martin, tiu de mia edzino, ci rememoras, Martin el la "Deux-Soeurs", kiu pereis.

Kaj la trinkejestro, kun tri glasoj en unu mano, karafeto en la alia, alproksimiĝis, dikventra, sangoriĉa, ŝvelaĉinta pro graso. Kaj demandis trankvilmiene:

— Nu! jen ci do estas, Martin?

Martin respondis:

— Jen mi estas!

Tradukis: R. Richez, (Genève).

BILDETO.

De Julius Janonis.

EL LA "LITOVA ALMANAKO"

Aŭtuno ploretas. Per koto de Litovuja vojo vadas longa, longega militistara vico. Apenaŭ vivaj unu post la alia kun malfacileco iras kuntiriĝintaj en kotigite grizaj, kiel ĉirkaŭantaj kampoj, manteloj, malgajaj soldatoj.

De kie kaj kien?

De kie, oni ne scias. Sed profunden enfalintaj, nenion esprimantaj okuloj, paliĝintaj vizaĝoj kaj la sama paŝado de tute laciĝintaj homoj atestas, ke de malproksime. Eble el mezo de Rusujo kaj eble eĉ el la malproksima Siberio... Ĉu tamen ne ĉio la sama? Tute egale ili estas forlasintaj siajn familianojn, eble sen pano restigitajn edzinojn, infanojn...

Kaj kien?

Kompreneble estas. Tien, de kie, kvazaŭ sonoj de malproksima tondro, alflugas jen pli fortaj, jen malpli fortaj sufokigitaj tondrobatoj... Kaj jam tie ĉi aŭdiĝas eho de milito, kaj jen ĉi tie estas viktimoj de ĝi...

Kaj kontraŭvole rigardo turniĝas al la malrapide ŝanceliĝanta longa vico kaj akompanas ĝin tiel same, kiel jam multajn ilin akompanis, ĝis kiam malaperas for de okuloj la lasta homo...

Jam multaj ili foriris okcidentodirekten — sed kiu scias, kiom da ili revenos...

Kaj doloras la koro, doloregas, ekvidinte, sur kiel ankoraŭ malalta nivelo staras la homo...

Esperantigis Liudas Alseika

LA OVO.

Albert Kivikas.

EL "LITERATURA MONDO"

Trans la marĉon kondukis piedsigna vojeto, dronanta en marĉeto, leviganta sur altajeton, trairanta arbetajojn kaj ebenajon, serpentumanta kvazaŭ stria kolubro ĉirkaŭ dika arbo, finkondukanta tamen al sablejo, al mizera kabano.

Laŭ tiu piedsigna vojeto hejmenpaŝis laboristo, havante lacecon kvazaŭ ŝarĝon de sablo en karno kaj sango, kaj en la stomako kvazaŭ malsatajn hundojn kolere bojantajn. Pro malforteco liaj piedoj fleksiĝis kaj devigis lin sidiĝi sur altajeto por ripozo.

Sidas la viro, laciĝinta, luktanta kun la dormo; preskaŭ perforte la okuloj fermiĝas.

Dormas la viro kaj subite ekaŭdas, kiel ju plaŭdante venas laŭ la akvoplena vojeto kaj murmuras.

— Verŝajne hundo, — pensas la viro, kaj ne malfermas la okulojn — ĝi vagadu!

Sed la murmurado kaj plaŭdado jam estas tute proksimaj.

Nun la viro volas malfermi la okulojn, sed la palpebroj estas strange pezaj; li provas per la dika fingro suprentiri ilin, per la manplato li viŝas la vizaĝon — nenio helpas, li ne povas malfermi la okulojn.

Sed la murmurado proksimiĝas pli kaj pli.

Subite rimarkas la viro, ke li vidas ne malferminte la palpebrojn, tute klare li vidas per siaj okuloj tra la fermitaj palpebroj.

Jen: granda lupo venas laŭ la vojo, la vosto treniĝas en nura akvo, la kolsupro suprenstaras kvazaŭ la haregoj de virporko, sed la okuloj estas fermitaj — kaj ĝi murmuras. Rigardas kaj rigardas la viro tra la fermitaj palpebroj kaj miras:

— La okuloj de la lupo estas fermitaj, sed ĝi sen deflankiĝo rekte iras la vojeton! Miraklo de mirakloj, ĝi iras sen deflankiĝo la vojeton kaj murmuras!

Sed la lupo, plaŭdante, pli kaj pli alproksimiĝas.

Ho! Ĝi kvazaŭ havas ion en la buŝo?

Rigardas kaj rigardas la viro, kaj vidas: la lupo havas kokinan ovon en la buŝo. Rigardas la viro ankoraŭ pli fikse: jes, la lupo efektive havas kokinan ovon en la buŝo!

Pensas la viro, kion do faru la lupo kun la kokina ovo: neniam dum sia vivo li aŭdis, ke la lupo manĝas ovojn.

Stelrigardas kaj stelrigardas la viro la ovon en la buŝego de la lupo, kaj subite eksentas kolektiĝi la salivon en la buŝo pro apetito — li estas tre malsata, kaj eble la ovo estas kuirita kaj manĝebla.

Sed la lupo, ne malfermante la okulojn, pli kaj pli proksimiĝas laŭ la vojeto, inter la dentegoj ĝi portas la ovon, la tutan tempon murmurante.

Ĝi jam preskaŭ estas atinginta la viron, kiam ĉi tiu subite ekkrias: — He!

La lupo pro timo ekbojas, faligas la ovon el la buŝo, malfermas la okulojn, ekvidas la viron kaj forkuras arkaron. Sed la ovo restas suliĝanta sur la vojeto.

— Ovo, — pensis la viro — ovo kiel ovo!

Sed mirinde granda estas ĉi tiu ovo, pli granda ol tiu de anaso aŭ de ansero.

La ovo eble estas kuirita — pensas la viro denove, kaj ekprenas ĝin en la manon.

Sed la ovo estas varma, kvazaŭ jus prenita el la kaldrono. Palpas la viro ĝin de ĉiu flanko — sed subite — la ovo ekmurmuras!

Li rompis per tranĉilo ĝian ŝelon, la murmuro ĉesis. La ovo estis efektive kuirita, eĉ la ovoflavo estis malmola.

Manĝas la viro longan tempon avide la ovon, li mangas, sed formanĝi ĝin ne povas. Li estas jam tute sata, sed duono de la ovo estas ankoraŭ ne formanĝita.

— Restos eĉ por mateno — pensas la viro, kaj metas la duonovon en sian sakon.

Post tio li, sur la altajeto, ekdormas profunde.

Matene vekiĝinte li vidas:

Nenie plu estas la duonovo, en la sako troviĝas la vosto kaj la malantaŭaj femuroj de lupido.

El la estona: Hilda Dresen.

LA URBO.

De Enric De Fuentes.

EL LA "KATALUNA ANTOLOGIO"

Post la Kandelfesto, ĉiujare Laŭrenco veturis Barcelonon por enspezi la renton de mono kiun li havis en akcioj de tiu fervojo trairanta lian bienon, de tiu fervojo, kiu ŝajnis al li plugisto produktiganta lian karan monon. La lokomotivoj faradis sulkon sur la vojo, la vagonoj estis la semantoj,

kaj li kolektis la rikolton. Domaĝe,ke tiom da partohavantoj estis en tiu negoco: la obligaciistoj forgajnis preskaŭ ĉion.

Laŭrenco sciis ja,ke posedo de fervojaj akcioj plej ofte signifas esti mastro de tio kio estas pagota, kaj certe li ne lasus sin fuŝlogi per paperaĉoj de iu ajn alia fervoja entrepreno,sed tiu fervojo estis la lia, ĉiumatene la lokomotivoj diris al li bonan tagon; la veturantoj, kiujn la vagonaro kondukis oni ne scias kien, elkliniĝis al la fenestroj de la vagonoj por rigardadi tiujn kampojn tiel bone kulturitajn, pri kiuj fieris Laŭrenco, kaj li sentis inklinon al la vagonaroj, kiujn li konsideris kvazaŭ hejmokonatoj kaj dankiŝ al la veturantoj, ke ili eligis siajn kapojn el la fenestro.

Kiu scias ĉu tiuj viroj kaj virinoj, kiuj forveturis enkaĝigite, finalveninte, parolis—al parencoj kaj konatoj—pri la bieno de Laŭrenco...

Ĝi estis granda bieno kaj la mastro ŝparis neniom por ĝi. Ĉiujare, kiam li iris Barcelonon por enspezi la kuponojn, li delasis en la urbo ne malgrandan kvanton da mono tie ricevita. De kiam, ĉirkaŭ Aprilo, aperis anonco pri tio, kiom oni en Julio donos kiel gajnon de ĉiu akcio, li ekmeditis kiu nova maŝino estos al li plej taŭga. Kaj li daŭre pripensis tion, kaj kiam li estis decidinta, li repripensis kaj kiam li estis tute pensinta, parolis pri ĝi al sia edzino. Kaj ŝi trovis tion ĝusta, kaj en Februaro, al Barcelono, por aĉeti la ilon.

Kaj Laŭrencon akompanis lia plej aĝa filino: Rozo.

Tiu vojaĝo al la urbo estis la revo de la riĉa kamparanineto; la revo kovita dum tuta jaro. De kiam ŝi atingis la vilaĝon, reveninte el Barcelono, ĉiutage ŝi raviĝis rigardante la irojn kaj reirojn de la vagonaro], ĉiam kun la sama dezirego,ke ili forkonduku ŝin malproksimen, en tiun urbon tiel belan, kie ĉio estas movo kaj ĝojo. Ĉiun fojon kiam la vagonaro revenigis ŝin hejmen, ŝi diris "ĝis revido" al la urbo per la samaj vortoj: ĝis venonta jaro! Kaj ŝi diris tion tute malgaja, kaj por ŝi pasadis malgaje semajnoj kaj monatoj. Kiom longa estis por Rozo la somero! Ĉiuj Barcelonanoj venintaj en la vilaĝon nur rememorigis al ŝi la sopiratan urbon, kaj ĉar ili estis tiel proksime, ŝajnis al ŝi,ke Barcelono estas pli malproksime, ŝajnis al ŝi ke, kiel tiuj aliurbanoj, la maŝinoj povos iri al la vilaĝo, kaj la patro de Rozo ŝparos vojaĝojn, kaj ŝi ne povos reiri tien, kie ĉiam estas plej granda festo. Kiel malfruis Kristnasko! Kia malvarmo en la vilaĝo dum la malgajaj monatoj! En Barcelono sendube neniam estis malvarme kun tiom da lampoj ĉiam brulantaj, kaj kun tiom da domoj haltigantaj la blovojn de okcidento: sendube neniu sidis kuntirite apud la fajro, ĉiuj promenis certe en la strato sub la suno, tiu suno tiel sinjora,kiu ne brunigis,kiel la vilaĝa.

La suno! Rozo rigardadis malafable la vintran sunon, kvazaŭ riproĉe tial ke ĝi leviĝis malfrue. Kaj kiam ĝi ekestis pli fruema, kaj Rozo lumblindiĝis rigardante ĝin, ŝiaj okuloj plenĝojis, kaj ŝi iradis kaj reiradis al la fruktarbaro kaj petis al la migdalarboj ke ili rapidu ekflori.

Kaj kiam la brančaro de migdalujoj ŝajnis bukedo de jasmenoj greftita je rozo, la knabino pasigis multe da tempo sub la florintaj arboj; kaj dum ŝi revadis nur al la sopirata urbo, la suno, ludetante, eniĝis de l' brančaro. Kaj sunmakulo falis sur Rozon, kaj ŝi, blindigita, fermis la okulojn. Havis la vizaĝon lentuga kaj la harojn ruĝaj la kamparana knabino; kun fermitaj okuloj, plenbanita de l' suno, kaj apud la florinta migdalarbo, Rozo aspektis kiel kupra idolo sub flora baldakeno.

Kaj kiam, en la vagonaro, Laŭrenco kaj lia filino pasis sur tiu sulko, kiun en la bieno faris la lokomotivo,—la granda plugisto,—la knabino ne estis jam tiel kontenta kiel antaŭan tagon, ŝi pensis jam al malgajeco de la reveno. Sed, alveninte Barcelonon, tiu malĝojo malaperis, kaj la plezuro esti ĉe la granda urbo forvišis eĉ la rememoron pri antaŭaj nostalgioj.

Ho, la urbo! Granda homamaso ĉie, la veturiloj kurante kvazaŭ spiritposeditoj, muzikistoj en la stratoj, sonorilbruo ĉiuhore, surdiganta kriado, bruado,kiu ne permesis aŭdi la malsilenton de la maro, de tiu senfina vico da ondoj venantaj el malproksime, tre malproksime, el tie,kie la ĉielo klinigas por donadi al ĝi kisojn. Nenia malĝojo estis en la urbo, ĉar ĉiu rapidis kun okuloj brilantaj kaj firma paŝado, ĉar oni vidis ĉie signojn de festo, kaj la promenejaj arboj larmis ligajojn de rubandoj el senkolorigita papero,—ĉifonoj de antaŭjara gajeco,—kaj en stratoj kaj placoj regis nova ĝojo. Ĉiu estis riĉa en la urbo: mono abundegis, veluron kaj silkon oni vestis ĉiutage, kaj en la montrejoj de juvelistoj neniam oni revidis la samajn juvelojn de antaŭ jaro. Ĉiu amis en la urbo, ĉar sufiĉe diris tion la rigardoj de tiuj altrangaj virinoj promenantaj sur nekovritaj veturiloj, tirataj de du ĉevaloj kun floroj ĉe l' jungaĵoj. Ĉiu estis amata en Barcelono, eĉ la knabinoj kun lentuga vizaĝo, eĉ tiuj kun ruĝaj haroj.

Kaj kiam vesperiĝis kaj oni bruligis tiun belan lumilaron, kaj la tempo reveni vilaĝon estis jam proksime, kiel belaj Rozo trovis la ridojn de la homoj kaj la juvelojn de la elmontrejoj, kaj la virinojn rigardantajn kun amaj okuloj! Ho! Se ŝi povus nur pasigi unu nokton en la urbo, en tiu urbo,kie oni sonĝis tiel belajn aferojn, kiel tiuj klarigitaj en amrakonto! Se ŝi povus scii kiel parolas pri amo, en la urbo, tiuj kiuj amas la knabinojn kun lentuga vizaĝo kaj ruĝaj haroj!

La urboj estas bonaj nur por nelonga tempo,—Laŭrenco diris al sia filino, revenante sian vilaĝon.

Trad. Marian Sola, L. K.

LA PLEJ JUSTA JUĜO.

LAŬ HINDA FABELO.

EL "LITERATURA MONDO"

Ramigan, la granda skeptikulo, kies sentencoj kaj juĝoj estis famaj de la Flava Maro ĝis la Tigro kaj Eŭfrato, sidis trankvile kaj bonhumore inter siaj disĉiploj.

"Saĝulo granda" — diris unu el ili — "via saĝo lumas kiel la torĉo en la nokto de l' densejo. Niaj animoj soifas ĝian lumon, jetu al ni radion el ĝi".

La Majstro, kiu post bonaj kaj abundaj vespermanĝoj kutime rakontis ion al siaj disĉiploj — ĉar la rakontado favore influas la digestadon — diris afable:

"Bone, mi rakontos al vi mian plej justan jugon. Aŭskultu atente!

En hinda vilaĝo vivis bramano. Li ne estis tro

riĉa, sed tamen li havis grandan trezoron: filinon kiu estis pli bela ol la matenruĝo, pli gracia ol la lotusfloro tremanta en la arĝentaj radioj de la luno. Ŝia korpo estis pli freŝa ol la ŝaŭmo de la printempa torento; en ŝiaj okuloj brulis misteraj flamoj kaj inter ŝiaj haroj abundaj kaŝis sin dolĉa animo de jasmenfloroj. Oni diris, ke Kamadeva flugadas ĉiam ĉirkaŭ ŝi, kaj jetas el sia flora pafarko sagon al ĉiu viro, kiu kuraĝas al ŝi proksimiĝi. Oni nomis ŝin Madhupamanjari, ĉar kiel la flora branĉo la abelojn, ŝi allogis ĉiujn virojn per sia dolĉa altirforto.

Kvar junuloj svatis pri ŝia mano. Sed ŝi ne povis elekti. Ŝia koro, kiel la kano en la vento, kliniĝis jen al unu, jen al la alia.

Foje, kiam ŝi dormis en la ĝardeno, venena serpento mordis ŝin. Kaj ŝi mortis.

Neeldirebla doloro kaptis ĉiujn. La patro mortis pro la terura korturmento. La amantoj ploris kaj veis.

La unua ne povis elporti la vivon sen ŝi. Kiam oni, laŭ la sanktaj kutimoj, bruligis ŝian kadavron, li jetis sin en la flamojn, kaj pereis. Liaj cindroj miksiĝis kun la cindroj de la adorata knabino.

La dua faris sanktan promeson, ke ĝis la fino de sia vivo li ne formovigos de la kara tombo, li gardos fidele ŝiajn cindrojn.

La tria ektiris siajn ŝultrojn, kaj trankvile, kvazaŭ nenio estus okazinta, li reiris en sian vilaĝon.

La kvara serĉis forgeson per vagado tra la mondo.

Ci tiu lasta do vagis migrante dum longa, longa tempo. Foje, malfruan vesperon, li venis al dometo, kaj laca li petis tie noktan ripozlokon. La mastro akceptis lin gastame kaj regalis lin per bona vespermanĝo. Sed jen, la filo de la mastro, petolema infano, kiu kuradis ĉirkaŭ la tablo, ekfalinte kaptis al la rando de la tablotuko kaj jetis ĉiujn vazojn al la tero. Pro rompiĝo de la vazoj la patro forte ekkoleris, kaj en sia subita furoro li kaptis sian filon, kaj jetis lin en la fajron. Vidante la kruelan morton de la infano forte indigniĝis nia migranto. "Kia kruelo, kia abomeno! Eĉ momenton mi ne restos plu en la domo de tia homo!" — li kriis kaj volis foriri. "Trankvilon, kara!" — diris la mastro — "okazis ja nenio grava". Kaj li prenis libron, legis el ĝi sep sorĉajn vortojn kaj jen, la infano saltis vive, gaje el la cindro.

Senpacience atendis nia migranto la nokton. Kiam ĝi alvenis, li prenis al si la libron kaj ŝtele foriris el la domo, kaj tage-nokte, senripoze li rapidis, la batoj de lia koro, kvazaŭ instigantaj vipofrapoj pelis lin al la hejmo, al la tombo de la adorata Madhupamanjari.

Veninte al la tombo, li legis el la libro la sep sorĉajn vortojn, kaj jen, kiel Ŝri, la diino de l' amo el maraj ondoj, leviĝis Madhupamanjari el la cindroj vive, ridetante, en centobla beleco.

Sed kun ŝi leviĝis ankaŭ la junulo, kiu jetis sin en la flamojn.

Kaj ĝojkriante saltleviĝis, etendante siajn rigidajn membrojn, la ĝis nun senmova gardanto de la tombo.

Kaj la rapide disvastiĝinta famo pri la mirakLo baldaŭ alvenigis ankaŭ la kvaran junulon.

Do denove kvar junuloj svatis pri la mano de Madhupamanjari. Kaj ŝia koro restis, kiel la kano en la vento. Ŝi ne povis decidi.

Fine ŝi diris: "Tiu havu min, kiu pleje min meritas". Kaj ili venis al mi por peti mian juĝon.

"Kaj vi? Al kiu vi juĝis ŝin?" demandis scivole la disĉiplo.

"Mia saĝo eldiris la juĝon jene:

Kiu revivigis la knabinon, tiu meritas, ke li estu ŝia patro, ĉar li donis vivon al ŝi.

Kiu jetis sin en la flamojn, tiu meritas, ke li estu ŝia frato, ĉar li estis tiel oferema.

Kiu gardis fidele la cindrojn, tiu meritas, ke li estu ŝia sklavo servema por ĉiam.

Kaj kiu ektiris la ŝultrojn, kaj trankvile hejmeniris, tiu meritas, ke li estu ŝia edzo. Li havu la knabinon."

"Granda vi estas majstro!" Kriis la disĉiploj unuanime.

Teo Melas.



Giordano Bruno—martiro de l' libera penso.

EL "SENNACIULO"

Ne decas, ŝajnas al ni, malatenti per silento en "S-ulo" pri memordato, iom malproksima en la pasinto, sed malgraŭ tio ne malpli emociiga kaj instrua por ni. En ĉiuj jarcentoj mortis herezuloj por siaj ideoj, kiam ili malkaŝe elpaŝis kontraŭ dogmoj kaj kontraŭ la institucioj, kiuj predikas kaj disvastigas dogmojn. Bruno estas nur unu el multaj, sed unu el la plej admirindaj. RED.

Kiel admonanta flamsignalo por ĉiuj liberaj spiritoj lumas el la pasinto en nian ankoraŭ ĉiam tiel malluman tempon la lignoŝtiparo de Giordano Bruno, kiu estis bruligata je 17. februaro 1600 laŭ la ordono de l' katolika eklezio. Unu el la plej bonaj, plej liberaj kaj plej kuraĝaj viroj ĉesis vivi antaŭ 330 jaroj sub la manoj de l' ekleziaj ekzekutistoj. Kiel bando da sangavidaj lupoj la altranga pastraro jetis sin sur tiun ĉi viron, kies korpon ĝi povis detrui, sen ke ĝi sukcesis ekstermi liajn pensojn.

Hodiaŭ ni apenaŭ povas imagi, ke la doktrino de Kopernik, kiu aperas al ni ĉiuj tiom memkomprenebla, iam plej akre eksecitis la spiritojn, ĉar ĝi ja renversis ĉion malnoviĝintan kaj forpuŝis la homon el lia pozicio kiel centro de l' universo kaj fineelo de l' kreado. La sango de multaj martiroj gluas je la nova doktrino, ĉar temis supervenki gigantan malamikon, arkaiĝintan mondkoncepton, kiu intime estis kunligita kun la plej granda politika potenco de l' epoko, kun la potenco de l' eklezio, kiu timis nenian rimedon por ekstermi siajn kontraŭulojn. Sed la novaj ideoj estis pli fortaj ol la reakcio.

Unu el la plej grandaj kaj entuziasmaj batalantoj estis Giordano Bruno, kiu en la jaro 1548

naskiĝis en Nola. Lia deveno ne estis tre nobla, ĉar lia familio estis malriĉa. En la 15. vivjaro li eniris kiel novico la monahejon de l' sankta Dominiko en Napoli, tre veršajne, por povi dediĉi sin malgraŭ sia malriĉo al la scienco. En tiu ĉi monahejo li pasigis 13 jarojn. Estas kompreneble, ke tiel liber-ama genio jam frutempe devis ribeliĝi kontraŭ la spirita devigo de l' monaheja vivo. Baldaŭ ekokazas interpuŝiĝoj kun la estroj. Tro malvasta kaj tro malgranda fariĝis la mondo de l' mezepoko, "kiam la admonanta vorto de Koperniko frapis al la pordo de lia junula animo". Per liberaj opiniesprimoj kaj per la legado de malpermesitaj libroj il fariĝis suspektata. En la jaro 1575 la provinca estro de lia kongregacio prezentis gravan akuzon kontraŭ li pro herezo. Ĉi tiu aperis al Bruno kune kun personaj malamikajoj de malbonintencaj kunkongregacianoj tiel dangera, ke li forkuris de Neapolo al Romo, por sin mem defendi ĉe la prokuroro de l' kongregacio. Sed malbonaj sciigoj sekvas lin; malpermesita libro estas trovita, kiun li estis jetinta antaŭ la forkuro en sekretejon de la monahejo. Li nun demetis la monahan kostumon kaj vagis kiel privatinstruisto tra la italaj urboj. En Genovo la forkurinto unuafoje haltis. Ĉi tie li havis okazon observi la tutan degeneron de l' religio, kiu akuzis kaj persekutis lin kiel herezulon. Guste estis solenata grava eklezia festo kaj la monahoj de Kastelo (**Castello**) elmontris sian plej sanktan relikvajon, nome la haŭdiran voston de l' azenino, kiu portis la Sinjoron dum lia lasta paska vojaĝo. La kredema popolo alpremiĝis al la silkokovrita sanktajo, kaj la monahoj **kriis kiel la foir-marĉandistoj**: "Ne tuši! Kisu ĝin! Estas la relikvajo de tiu sankta azenino, kiu estis konsiderata digna porti nian Disinjoron de la Olemonto al Jerusalemo. Flaru ĝin! Kisu ĝin! Prezentu almozojn! Vi rericevos centoble kaj akiros la eternan vivon!" Naŭzita de tio, Bruno skribis tiam soneton kontraŭ la malklero kaj nepensemo, por scienco kaj racio, en sian taglibron.

Sed nenie la rifuĝanto estis ŝirmita. Ĉie embuskis la spionoj de l' inkvizicio. Tiel li, la filo de l' sudo, estis pelata trans la alpojn en la malserenajn nordajn landojn. En Genevo, la fortikajo de l' Kalvinismo kaj la rifuĝejo de multnombraj italaj protestantoj, li trovis okupon en la presejoj. Sed la espero de Bruno, esti atinginta sidejon de religia libero, estis maldolĉe trompata. Car li rifuzis ĉiujn konvert-altrudojn kaj eĉ havis la kuraĝon ataki la opiniojn de iu Geneva filozofi-profesoro per malgranda pamfleto, la eklezi-estraro malliberigis lin kaj **la** presinton de lia skribaĵo. Tri monatojn poste li skuis de siaj piedoj la Genevan polvon.

Senripoze li migris, serĉante panakiron, tra Svisujo kaj Francujo ĝis Anglujo. En la domo de l' franca ambasadoro Mikaelo de Kastelno (**M. de Castelnau**) li travivis la plej feliĉan tempon de sia vivo kaj du jarojn da ripozado kaj paco produktis senmortajn verkojn. Per verko pri la memor-arto li akiris al si la instru-rajton ĉe la universitato de Oksford. Dum granda universitata soleno li profitis la okazon, por varbi en ampleksa disertacio por la kopernika mondsistemo. Sed li havis kontraŭ si la tutan Oksfordan profesoraron. Mezepoko kaj moderno interduelis. Kiam la Oksfordaj profesoroj ne sukcesis refuti la opiniojn de l' malagrabla novigulo, ili prenis la lastan rimedon kaj malpermesis al li la instruadon. En lia publikigo "Cindromerkreda mangxo" Bruno tiam atakis plej akre la anglajn vivkondiĉojn kaj defendis per entuziasmaj vortoj la kopernikan mondsistemon.

Pensante pri Koperniko Bruno sentis sin kvazaŭ liberigita de katenoj. Kristalaj sferoj ĝis nun estis ĉirkaŭbarintaj la universon kiel malliberejaj muroj. Nun ili disrompiĝis kaj la kosmo fariĝis granda kaj vasta. Nur en la lasta sun-stela sfero la kopernika sistemo trovas limon. Sed la universampleksanta spirito de Bruno disbatis ankaŭ tiun kaj metis kun admirinda antaŭsentemo la malproksimajn sun-stelojn kiel sunojn similajn al nia Suno en la senfinan universan spacon.

La senfine multaj mondoj sur la ĉielo, tiel instruis Bruno, estas ĉiuj similaj inter si. La miloj da sun-steloj, kiujn ni vidas briletanta ĉe la nokta firmamento, estas sunoj, ĉirkaŭ kiuj planedoj rondiras, kiel ĉirkaŭ nia Suno. La substancoj, el kiuj kunmetiĝas la astroj, estas ĉie la samaj. Sed ankaŭ la ekzistokondiĉoj sekve ĉie estas la samaj, kaj ĉiuj malproksimaj kaj proksimaj planedoj devas esti loĝataj kiel nia Tero. Kion la scienco, la spektra analizo, esploris kaj instruis preskaŭ tri jarcentojn pli malfrue, tion la filozofo estis antaŭvidinta.

La multnombro da loĝataj mondoj estas kontraŭdira al la instruoj de l' eklezio kaj biblio kaj Bruno sciis, ke la eklezio lin tial persekutas kun nepacigebla malamo. Tiel li restis ekzilito en malserena nordo. Sed la sopiro al lia hejmo, al la blua ĉielo kaj la varmiga suno, ne forlasis lin kaj iĝis tiel forta, ke ĝi malfortigis la vočon de l' racio. Nobelo, Giovanni Mocenigo estas la nomo de l' malnoblulo, skribis al Bruno kaj logis lin al Venezio, pretekste por ĝui lian instruon. Ĉar Bruno estis en financa malbonstato, li sekvis la inviton.

En la nokto al 22. majo 1592 la nobelo kun ses viroj penetris en la dormoĉambron de lia instruisto kaj malliberigis lin. Komenciĝis penigа proceso. Bruno defendis sin kun suda temperamento. Sed la inkvizicio estas surda, se ĝi ne volas aŭdi. Oni celis lin rezignigi kaj minacis lin per la torturo. Oni transportis lin de Venezio al Romo, kie li ok jarojn estis tenata en karcero. Pri la jugtraktadoj nenio estas konata. Sed dum la longjara karcera restado kreskis la forto de spirito kaj karaktero de Bruno. Kio estas sorto de unu homo, se miloj da vivon donantaj sunoj movigas en la universo? Kion signifas malgranda homvivo, se temas batali por granda, mondliberiga ideo? Tiel li akiris la forton necedeme konfesi por sia instruo. Kaj lastfoje starante antaŭ siaj jugistoj,, li parolas aŭskultante la verdikton kun trankvila seriozo: "Kun pli granda timo vi konigas la verdikton, ol mi akceptas ĝin!"

En la 17. februaro 1600 Bruno suriris la en Romo starigitan ŝtiparon. La papo festis sian jubileon. Multnombraj el ĉiuj landoj ĉeestis en la Eterna Urbo. La plej altrangaj eminentuloj de la katolikaro amuzigis, arigitaj ĉirkaŭ sia ĉefo, la anstataŭanto de Kristo, ĉi tie pri la agonio de l' filozofo. Sed nenia krio eliĝis el li, kaj kiam iu el la ekzekutistoj tenis antaŭ liaj **okuloj krucon, li** deturnis sian kapon kun muta **malestimo.**

Tiel mortis la "princo de l' herezuloj", unu el la plej bonaj homoj kaj plej grandaj filozofoj. Sed liaj pensoj vivas ankoraŭ . . .

Kompiltradukita laŭ artikolo de E. Krug en germanlingva revuo "Der Freidenker" (La Liberpensulo)

Aforismoj, Sentencoj, Paradoksoj.

EL "LINGVO INTERNACIA"

Aforismo, kiel abelo, estas ŝarĝita per akiro kaj per pikilo. **Karmen-Silva.**

Nur unu vorteto donas indon al la ekzistado: la vorto "por". Viro diras: "por kio?",—virino diras: "por kiu?",—kaj infano respondas: "por mi!" **Karmen-Silva.**

Vivo neniam povas tedi, nur ni mem tedas al ni. **Karmen-Silva.**

Vi povas instruadi homojn nur tiam, kiam vi parolas en ilia lingvo. **Karmen-Silva.**

La unua filo de la unua patrino estis ribelisto kaj mortiginto. **Karmen-Silva.**

Homo diferenciĝas de besto per dubo. **Karmen-Silva.**

Se vi donas rifuĝejon al la hundo, mortanta pro malsato, kaj zorgas pri ĝi, ĝi neniam vin mordos. En tio ĉi konsistas la ĉefa diferenco inter hundo kaj homo. **Mark Twain.**

Ĉiuj diras: "Kiel malgaje, ke oni devas morti!" Stranga plendo en buŝo de homoj, kiuj devigis vivi. **Mark Twain.**

Ni konas perfekte la kutimojn de formiko; ni konas perfekte la kutimojn de abelo, sed ni nenion scias pri la kutimoj de ostro. Ŝajne ni ĉiam elektas neoportunan tempon por ellernadi ĝiajn kutimojn. **Mark Twain.**

Nenio tiel bezonas plibonigon, kiel la kutimoj de aliaj homoj. **Mark Twain.**

Por kio la homo havas liberan volon? Por ke li volu kaj ne povu. **Jozef Wasniewski.**

Per kia maniero oni povas fari bonon al la homoj? Neniam al neniu fari nenion.

Jozef Wasniewski.

IOM PRI TABAKO.

El "La ora epoko"

EL "SENNACIULO"

En Ameriko estis eldonata libro kun supra titolo konsistanta el 183 paĝoj, de distingita kompetentulo Bernarr Macfadden, kiu enhavas tiom da verecoj pri la tabakĝuo, ke ĉiu devus nepre koni ĝin. La homoj ne havas komprenon pri ĉiuj tiuj faktoj, ĉar la kuracistoj fumas mem, mem trompas sin pro tio kaj prisilentas, kaj ĉar ekzistas viroj, kiuj havas tiel fortan sanstaton, ke ili povas fari per sia korpo ĉiun misuzon preskaŭ nepunate. Granda diferenco ekzistas kompreneble ankaŭ inter la malgrava malutileco, kiun havas la fumo, se ĝi pasas nur la buŝon kaj nazkavon kaj la grava malutilego, kiun la fumo kaŭzas, se ĝi estas enspirata en la pulmojn.

En angla verko, kiu temas pri la "efikado de venenoj", estas dirite:

Multegaj gravaj kazoj de malsano devenas de la enspiro de tabakfumo kaj ĝia efiko je pulmoj, kaj mukhaŭtoj. Multe da okazoj rezultas el intenca aŭ hazarda enspiro de la tabakfumo. Nikotino estas la plej rapida kaj plej forte efikanta veneno, plej proksima al ciana acido.

La komparo de la nikotino kun la ciana acido estas ĝusta. Unu guto da ciana acido sur la lango de homo mortigas lin kiel fulmbato. Unu guto da nikotino sur la haŭto de kuniklo kaŭzas ties morton. Se la nikotino, kiun entenas unu sola cigaredo, estas ŝprucigata inter la haŭto, tio sufiĉas por mortigi homon, kiu ne estas kutiminta la tabakĝuon.

Sed la nikotinveneno ne estas la sola, kiu igas malutilega la tabakon. Se la tabako brulas, 70 procentoj de la nikotino aliformiĝas en piridinon kaj kolidinon; la aliaj 30 procentoj de la nikotino enspiriĝas.

Eltirajo de artikolo el la revuo "La ora epoko".

Tradukis H. Horo.

Ĉe Ahmed' Paŝa, la granda pentristo.

EL "LINGVO INTERNACIA"

Estis en Konstantinopolo, kaj la tago estis bela julia tago en la somero pasinta. Mia amiko Nehad Bej kaj mi, ni migris laŭlonge la strato, kiu iras de la ponto de la Galato ĝis Aja-Sofia. La suno bruligis, la hejtanta suno de tagmezo en la sudo—eĉ la plenforta altekreska bulgaro kun nudaj piedoj, brakoj kaj brusto, kun la flavkupra trumpeto en mano, kiu kuris antaŭ la omnibus', tiam kaj iam donante piedpuŝon al ia malrapida hundido, kiu ekdormis inter la koto sur la strato—eĉ ankaŭ li sopiregis pro la varmeco kaj streĉa laboro, dum li sencese kun la libera mano penis fari elfluon por la riveroj da ŝvito, kiuj sennombraj kiel la fontoj de Nilo, sin elverŝis super lia kuprokolora vizaĝo.

Sed ni du, Nehad Bej kaj mi, ne longtempe devigis sopiri pro la varmeco kaj la polvo sur la stratoj de Stambul. Ne multe da tempo pasis, ĝis ni atingis nian celon—la aristokrata domo de Ahmed Paŝa en unu el la mallaŭtaj, distingaj kvartaloj sur la suprajo de unu el la sep montetoj de Stambul.—Tie ĉi supre estis silente, tiel malbrue kaj "nobele". Neniaj vokantaj "verdajistoj" (vendantoj de verdajo por manĝo) tie ĉi kriis sian eternan **Tomati y-a, toma-ti-y-a,** neniaj malgrandaj hebreknaboj tie ĉi kurante ĉirkaŭ niaj piedoj postulis monerojn, neniaj levantanoj (homoj el Levanto, la bordo de l' Egea maro) trumpetis en niajn orelojn siajn senmezure eminentajn ecojn kiel gvidantoj kaj—la plej bona el ĉio—neniaj skabiaj hundoj kuŝis fermante por ni la vojon sur la strato.

Ĉe la frapado de Nehad Bej respondis apud la pordo de Ahmed ia platnaza, fulgenigra individuo, kiu, ŝajne, venis rekte el la Geheno, sed en vero kredeble nur estis el la plej suda Sudana provinco de l' Egipta hedivo.

Grimacante saluton de bonvenado, tiel ke la buŝanguloj malaperis en necerta malproksimo apud la regionoj de l' oreloj, li faris ĝentilegan orientan klinigon antaŭ mia altekreska turka amiko kaj, post mallonga rigardado de mia malsignifa persono kaj mia blanka sveda ĉapelo de studento, li rapideme forkuris por anonci al sia

sinjoro, la potenca Ahmed Paša, la fidelulo de l' sultano kaj eminenta ano de l' Grand-Sinjora kortego.

Dume alia servantulo min kondukis en la domon tra kelkaj koridoroj kaj super unu larga tapiŝa ŝtuparo, ĝis ni fine alvenis en la ĉambron de vizito.

Por mi, kiu pensis trovi ĉambron de turka modelo, kun longaj, malaltaj kaj molaj kanapoj laŭlonge la muroj, kun floraj ŝtofoj kaj multkoloraj teksaĵoj ĉie pendigitaj—kie konvenas kaj kie ne konvenas—, kun argilaj potoj kaj stanaj vazoj de stranga formo en vicoj sur la bretoj de muro, kaj plu en la sama stilo—por mi la vizita ĉambro de Ahmed ŝajnis tute surprizanta. Kelkaj invitantaj malgrandaj kanapoj, tie kaj ie taburetoj, granda tablo plena da modernaj ilustritaj verkoj, kelkaj **staflioj** kun pretaj aŭ ankoraŭ ne pretigitaj pentrajoj, kaj la muroj kovritaj—ne per multkoloraj ŝtofoj el Persujo kaj Kaŝmir', sed per tute eŭropaj desegnajoj, gravuroj kaj fotografajoj kune kun ia pentrajo. Inter la multaj portretoj de anoj de eŭropaj princdomoj aparte unu okupis mian atenton; estis de Oskar 1:a, nia reĝo, en uniformo de admiralo kaj ornamita kun la nomo, skribita, ŝajne, per la mano de l' reĝo mem.

Mia amiko Nehad—sed mi do forgesis prezenti lin al miaj legantoj! Li estas leŭtenanto ĉe la draguna regimento ĉevala de Lia moŝto Grand-Sinjora kaj cetere neordinare impozanta kaj bela viro. Lia kresko alta kaj gracia portas bele formitan kapon kun trajtoj, kiam li silentas, ŝajne fanditaj el bronzo, sed kiam li parolas—en franca kaj en tute bonega eminenta franca lingvo—ili viviĝas per la ŝanĝantaj dispozicioj de sentoj, kiuj, kontraŭ la turka kutimo, ŝajne regas mian amikon. Cetere estas la fundamento inter ili ia nesuperigebla kaj preskaŭ ne tro alte taksebla amindeco kaj amikeco, kiun malŝpare elverŝas ĝia posedanto sur la nemeritanta fremdulo el malproksima Nordo.

Sed dum mi staras okupite rigardante la akceptan salonon de Ahmed Paša kaj la militistan kreskon kaj vire belan vizaĝon de mia akompananto, tiam subite malfermiĝas la pordo kaj eniras la mastro mem, Ahmed Paša, la granda kortegulo kaj artisto. Malalta kaj ronda li estas kaj ŝajnas pli humora ol precipe impozanta kun tiu malgranda "stomakego", la nigraj, ludantaj okuletoj, kiuj tre similas al sekvinberetoj en tritikbulko, kaj la buŝo, sur kiu ludas humoristika rideto.

Al Nehad Bej, kiu en sia elkora ĝentileco kaj en la sento de l' alta rango de sia estro, ne tute bone scias, kiel profunde li kliniĝos aŭ ĉu sur la piedoj li riskos stari,—al li Ahmed salutas ĝuste **á la turque**, t. e. kun la du manoj levigitaj ĝis la tempioj kaj la manplatoj etenditaj unu kontraŭ la alia. Mi do kontraŭe ricevas post la prezentado koran tute "okcidentmondan" manpremadon kaj post mallonge mi kun la mastro estas en viva interparolado pri mia patrolando, kiun li tute ne konas, kaj ĝia reĝo, kiun li kontraŭe vidis kaj trovis "ĉarmanta".

Sed baldaŭ Ahmed Paša transiras al aliaj aferoj, ĉar li nur duone estas diplomato kaj monda homo, kaj plej proksime al lia koro sendube kuŝas lia **arto**. Kaj simile al ĉiuj "diletantoj" li tre volonte montras siajn laborajojn kaj aŭskultas la opinioju pri ili. Ankaŭ mi nun devis diri mian opinion pri liaj pentrajoj, kvankam li ne povis scii, ĉu mi komprenis liajn pejzaĝojn kaj "stilleben'ojn" pli bone ol ia bovino. Unu post l' alia estis eltirita el la granda amaso da pentrajoj, kiuj kovris la **staflioj**n kaj starigilojn kaj staris en amasoj apud la muroj; jen pejzaĝoj el Malgranda Azio, kun freŝa kaj superfluanta kreskajaro, jen el la senarbaj montetoj apud Bosporo, jen estis plenviva strata sceno el Stambul, jen ree ia frukto-, besto aŭ floropentrajo.

Li estis tre multflanka en sia pentrado, la bona paŝa', sed parolis tre humile pri sia talento, kio tamen ne malhelpis, ke liaj okuletoj lumiĝis per kontenteco, kiam mi elparolis mian ravon je liaj vere tre prosperintaj floropentrajoj. Li ne laciĝis, priskribante, kie, kaj ĉe kiuj kondiĉoj ĉiu aparta pentrajo estis farita, kaj rakontis laste, ke la laborajo, kiu nun lin okupis, estos donaco al lia Ottomana majesto.

Kaj nun la kafo estis enportita, la kafo, kiun oni senkondiĉe trinkas en ĉia vizito ĉe unu **osmanli**. Estis la ordinara turka malbonajo, kuirita tute dika kaj kun sukero, ke ĝi similis al la bruna melaso. Sed krudigita per tio, kion mi antaŭe suferis en tiu speco, mi sengrimace malplenigis mian malgrandan taseton, en grandeco simila al la ovingeto. Nehad Bej videble kontentege gustumis la dikan dolĉegan trinkajon kaj englutis grandegajn kvantojn de la sengusta, fadena kaj pastema turka konfitaĵo, kiu samtempe estis ĉirkaŭportita.

L' aŭdienco estis finita kaj ni leviĝis por adiaŭdiri. Sed tiam sekreteme Ahmed rakontis, ke li posedis ion, kion li devis montri al ni antaŭ ol mi iros. Kaj nun ni sekvis lin malsupren la ŝtuparon kaj poste per kelkaj tute turke aranĝitaj ĉambroj kun tapiŝoj kaj "divanoj" (kanapoj) kaj lignaj kradoj antaŭ la fenestroj, ĝis li fine haltis apud la eniro en sufiĉe malgranda, longeta ĉambro, malalta kaj ne tro bone lumigita. En la fono aperis tuta floraro kun grupoj kaj florbedoj kaj tie-alie iaj belegaj granat- kaj oranĝarboj kun iliaj brilaj fruktoj.

"Mais dites donc, mon général, qu'est ce que vous avez là?"... Kaj mi ekkomencis esprimi mian miron vidi tutan gardenon enmigrintan en tiu ĉambro, kiu devus esti tre malbona oranĝerio.— Mi malofte aŭdis pli koran ridon ol tiu, kiu sekvis miajn vortojn. Ahmed Paša ridis tiel, ke lia stomaketo saltadis kaj la sekaj vinberetoj tute malaperis en la tritika bulko, kaj Nehad Bej, kiu estis enigita en la sekreto, ridis kvazaŭ laŭ ofico kaj batis siajn genuojn en gajo, dum la malgranda paŝa' deviĝis sidiĝi, por ke li ne perdu la egalpezon.

La gajeco de l' du turkoj sendube estis infektanta, sed ne scianta, je kio ili en vero ridis, mi komence iom ĝenis kaj min tenis serioze, ĝis la malgranda paŝa', kun la larmoj, ruliĝantaj super liaj grasaj vangoj, fine ekkriis: "Sed ĉu vi do ne vidas, ke ĝi nur estas pentrajo? Estas, ke mi min amuzis dekoraciante la muron tie kun floroj kaj arbetoj kaj arboj—kaj ĉiuj enirantaj tien-ĉi pensas, ke estas malgranda ĉambroĝardeno. Ho ho ho, hi hi hi,"... kaj li denove enfalis en vida paroksismo, en kiu mi nun volonte partoprenis.

Kaj tiam li rakontis al mi—tute ne por fanfaronado sed "nur kvankam"—ke unu foje li prosperis pentri sur blanka muro en la ĝardeno de l' sultano unu floran bedon tiel naturan—**parole d'honneur, monsieur,** nenia fanfaronado, nur la vero—ke Lia Moŝto Grand-Sinjora favore lasis sin trompigi kaj aliris por preni unu floron! Kaj la ĝardepisto poste venis kun sia akvujo kaj superverŝis la pentritan de Ahmed florbedon egale malŝpare kiel la florojn kiujn li mem antaŭe plantadis —faro, kiu kuntiris super la kapon de l' ĝardenisto la Grand-Sinjoran malfavoron, kiu tamen estis reprenita, kiam Ahmed Paŝa remetis la florojn en ilia unua brila ordo.

"Sed Vi do estas alia Apelles, mia generalo, kaj kompare vin, estis Zeuxis kaj Panhasios nenio alia ol simplaj nudaj maltaŭgulo!"—Mia komplimento estis akceptita kun favora rideto,—ankoraŭ unu manpremo kaj post kelkaj minutoj estis mia vizito ĉe Ahmed Paŝa, la granda kortegulo kaj artisto —nur unu rememoro.

Valdemar Langlet.

KIU SCIAS.

ANATOLE FRANCE.
EL "SENNACIULO"

La homa speco ne kapablas senfinan progreson. Estis necese, por ke ĝi kresku, ke la terglobo estu en iaj fizik- kaj kemiaj kondiĉoj, kiuj ne estas konstantaj. Estis tempo, kiam nia planedo ne taŭgis por la homo: ĝi estis tro varma kaj tro malseka. Venos tempo kiam ĝi ne plu taŭgos por la homo: ĝi estos tro malvarma kaj tro seka. Kiam la suno estingiĝos, kio ne povas ne okazi, la homoj estos jam de longe malaperintaj. La lastaj estos tiom senigitaj kaj stultaj kiom estis la unuaj. Ili estos forgesintaj ĉiujn artojn kaj ĉiujn sciencojn. Ili sterniĝos mizere en kavernoj, ĉe la bordo de glacimontoj, kiuj rulos tiam siajn travideblajn blokojn sur la foriĝintaj ruinaĵoj de la urboj, kie nun oni pensas, oni amas, oni suferas, oni esperas. Ĉiuj ulmoj, ĉiuj tilioj estos mortigitaj pro malvarmo; kaj nur la abioj regos sur glacia tero. Tiuj lastaj homoj, senesperaj, eĉ tion ne sciante, konos nenion pri ni, nenion pri nia genio, nenion pri nia amo, kaj tamen ili estos niaj nove naskitaj infanoj kaj la sango el nia sango. Restaĵo el reĝa inteligenteco, hezitanta en ilia malsubtiliĝinta cerbo, konservos ankoraŭ al ili dum kelke da tempo, la imperion sur la ursoj multiĝintaj ĉirkaŭ iliaj kavernoj. Popoloj kaj triboj estos malaperintaj sub la neĝoj kaj glaciaĵoj, kun la urboj, la vojoj, la ĝardenoj de la malnova mondo. Apenaŭ kelkaj familioj daŭrigos la ekzistadon. Virinoj, infanoj, maljunuloj intermiksite malvigliĝintaj vidos tra la fendoj de siaj kavernoj malgaje supreniri super siaj kapoj malhelan sunon sur kiu, kvazaŭ sur estingiĝanta bruleĵo, kuros flavbrunaj lumetoj, dum duonblindiganta neĝo el steloj daŭrigos brili la tutan tagon en la malluma ĉielo, tra la frostega aero. Jen tio, kion ili vidos; sed pro ilia stulteco, ili eĉ ne scios, ke ili vidas ion. Iam, la lasta el ili elspiros sen malamo kaj sen amo en la malamika ĉielo la lastan elspiron homan. Kaj la terglobo daŭrigos ruliĝi, kunportanta tra senbruaj spacegoj la cindrojn de la homaro, la poemojn de Homero kaj la plej noblajn rompitaĵojn el la grekaj marmorskulptaĵoj, alligitajn ĉe siaj glaciaj flankoj. Kaj nenia penso ne sin ekĵetos al la senlimo, el la sino de tiu globo kie ia animo tiel senlime kuraĝis, almenaŭ neniu penso de homo. Ĉar kiu povas diri, ĉu tiam alia penso ne konsciiĝos pri si mem kaj ĉu tiu tombo, kie ĉiuj ni dormos ne estos la naskiĝloko de nova animo? De kia animo, mi ne scias. De la animo de la insekto, eble.

Apud la homo, malgraŭ la homo, la insektoj, la abeloj, ekzemple, kaj la formikoj jam faris mirindaĵojn. Estas vere, ke la abeloj bezonas, kiel ni, lumon kaj varmon. Sed estas senvertebruloj malpli frostotimemaj. Kiu konas la estonton rezervita al ilia laboro kaj al ilia pacienco?

Kiu scias, ĉu la terglobo ne iĝos taŭga por ili, kiam ĝi ne plu estos tia por ni? Kiu scias ĉu iam ili ne konsciiĝos pri si mem kaj pri la mondo? Kiu scias, ĉu iliavice ili ne laŭdos Dion?

El "La ĝardeno de Epikuro," trad. E. L.

Nova hipotezo pri deveno de Aŭstralio.

EL "LINGVO INTERNACIA"

Aŭstralia kontinento tiel distingiĝas inter ĉiuj ceteraj kontinentoj de l' tera globo kaj prezentas tiajn rimarkindajn anomaliojn, ke ĝia deveno ŝajnis ĉiam enigma. Antaŭ ĉio turnas atenton en Aŭstralio plena foresto de efikantaj aŭ estingiĝintaj vulkanoj kaj eĉ de ĉiuj postsignoj aŭ aludoj pri vulkana efikado, malgraŭ tio, ke Aŭstralio troviĝas en la centro mem de seninterrompa vulkana duonringo, kiu ĉirkaŭas ĝin en tre proksima spaco kaj kiu finiĝas en Nova Zelandio. Tiu ĉi fakto estas tiom pli neklarigebla, ke subtero de Aŭstralio konsistas nome el tiaj ŝtonaj specoj, en kiuj ĉiam oni observas postsignojn de vulkanaj influoj. Sur la tuta tera globo nenie estas tia granda placo, konsistanta el primitivaj specoj aŭ formacioj, en kiuj oni observas ion similan al tio, kion oni observas en Aŭstralio, t. e. plena foresto de ĉiaj postsignoj de vulkanaj aperoj, kiel en nuna, tiel ankaŭ en estinta tempo. Krom tiuj ĉi anomalioj en Aŭstralio ekzistas ankoraŭ multaj strangaj apartecoj, distingantaj ĝin de ceteraj kontinentoj de l' tera globo. Tiajn samajn apartecojn prezentas ankaŭ aŭstraliaj montoj. Kontraŭe al aliaj kontinentoj en Aŭstralio ekzistas nur escepte apartaj altajoj, tute izolitaj kaj ne kunligitaj inter si. Solan escepton prezentas la monta ĉeno, kiu sin tiras laŭlonge de orienta kaj parte de sud-orienta bordo. Sed formiĝo de tiu ĉi ĉeno povas esti klarigita per tio, ke interspacoj inter apartaj altajoj estis eksplenigitaj per produktoj de rapida disfalo de ŝtonaj masoj, dank' al la proksimeco de l' oceano, akcelanta pli rapidan detruadon de l' ŝtonaj specoj. Tian anomalion prezentas en Aŭstralio ankaŭ la foresto de grandaj riveraj sistemoj; tie estas nur malgrandaj riveretoj, ofte sekiĝantaj kaj fluantaj laŭ iaj fosajoj. Dum sur ĉiuj aliaj kontinentoj ekzistas vastaj valoj kaj ebenajoj kaj

grandaj riveraj sistemoj, liverantaj al la tera suprajo pli aŭ malpli senĉesan irigacion. En Aŭstralio videble tute ne ekzistas subteraj fontoj en internaj partoj de kontinento, kaj irigacio de tero estas tre neregula. Nur en certa tempo de jaro, post la periodo de pluvoj disvolviĝas kreskajaro, dank' al granda malsekajo; en alia tempo la internaj partoj de kontinento prezentas sekan, ŝtonan kaj senfruktan dezerton. Rimarkinda ankaŭ estas tio, ke la suprajo de aŭstralia kontinento estas elsulkigita en ĉiuj direktoj per multenombraj fendoj, kies deveno estas nekomprenebla, ĉar oni ne povas alskribi ilin al la efiko de vulkanaj fortoj. Ĉiuj tiuj ĉi anomalioj, renkontiĝantaj sur la aŭstralia kontinento, tre enigmaj kaj nekompreneblaj, fariĝas facile klarigeblaj, se nur akcepti hipotezon pri meteora deveno de Aŭstralio. Tiu ĉi hipotezo en unua fojo estis eldirita de franca instruitulo Djufren kaj aplenigita de Frohmann en lia nova laboro "les merveilles de la flore primitive", antaŭ nelonge elirinta en la mondon. Kvankam tiu ĉi hipotezo pri "netera" deveno ŝajnas mirinda kaj kuraĝa, tamen oni devas konfesi, ke ĝi havas nenion nekredeblan aŭ neeblan, aparte ĉe tiuj faktaj pruvoj, kiujn alkondukas la instruitoloj por pravigi sian teorion. Antaŭ ĉio ili montras tion, ke laŭ la teorio de formiĝo de l' planeda sistemo la tera akso devus esti vertikala al la ebenaĵo de ekliptiko, dume ĝi staras ne rekte sed klinite al la ebenaĵo de l' tero ĉirkaŭ la suno, kontraŭ al ĉiuj teoriaj meditadoj kaj leĝoj de mehaniko. La historio de tiu kreskajaro sur la tera globo, dank' al kiu formiĝis la kušantaj en la interno de l' tero ŝtonkarbaj tavoloj, donas kelkajn montrojn, konstatantajn hipotezon pri antaŭa vertikaleco de l' tera akso. Tiuj ĉi ŝtonkarbaj tavoloj estas dismetitaj laŭ la tero tre neegalmezure: en ekvatora kaj en tropikaj regionoj tiuj ĉi tavoloj renkontiĝas malofte kaj estas tre maldikaj, dum en mezaj kaj polaraj landoj ili troviĝas en superfluo kaj distingiĝas per dikeco kaj vastigiteco. Krom tio ne estas dubebla la fakto, ke la ŝtonkarbaj tavoloj en nordaj kaj polusaj termezuroj devenis multe pli frue, ol en plej proksimaj al la ekvatoro termezuroj, kaj tio ĉi klare montras, ke la kreskaĵa vivo sur la tero disvolviĝas komence ĉe la polusoj, kaj post tio jam de tie disvastiĝas al la ekvatoro. Riĉeco de ŝtonkarbaj tavoloj en nordo atestas pri neĉirkaŭpreneblaj kvantoj da surtavoliĝintaj tie kreskaĵaj restoj kaj pruvas, ke polara floro en la ŝtonkarba periodo per sia riĉeco malproksime superis eĉ la nuntempan tropikan floron. Kompreneble, por tio, ke povu disvolviĝi tia kreskaĵaro, estis necesaj lumo kaj varmo, kaj tial oni devas volene-vole supozi, ke en la polusaj landoj en tiu ĉi periodo ekzistis favoraj kondiĉoj por disvolviĝo kaj kresko de kreskaĵoj; tiuj ĉi samaj kondiĉoj estas neeblaj ĉe ekzistanta nun kliniĝo de l' tera akso kaj oni devas supozi, ke tiam tiu ĉi kliniĝo ne ekzistis, la akso de l' tera turniĝo staris rekte, kaj sur la tuta tero de l' polusoj ĝis la ekvatoro estis nur unu seninterrompa kaj nešanĝebla tempo de jaro, kaj la tagoj estis egalaj al la noktoj. Kial devenis tiu ĉi kliniĝo, elvokinta subitajn šanĝojn de klimato sur la tero? Suprenomitaj instruitoloj proponas la sekvantan hipotezon por klarigi tiun ĉi aperon: la kliniĝo de l' tera akso devenis sub influo de ekstera forto, kiu subite elbatis la teran globon el ĝia komenca situacio. Tia "ekstera" forto povis esti grandega meteora maso, falinta sur la teron el la profundaĵoj de l' ĉiela spaco, kiu per sia falo neniigis la antaŭan egalpezon de nia planedo. Falado de kosmaj korpoj prezentas sufiĉe oftan kaj ordinaran aperon sur la tera globo. Laŭ la alproksimitaj elkalkuloj sur la teron falas en dudek kvar horoj kelkaj centoj da miloj da meteoroj. Plej ofte tiuj ĉi meteoroj estas malgrandaj laŭ sia amplekso, tamen iafoje renkontiĝas inter ili grandegaj. Nenio estas nekredebla en tiu supozo, ke en la sferon de l' tera altiro povis veni tre granda kosma korpo, kies falo estis la kaŭzo de šanĝoj sur la tera globo. Tiu ĉi grandega laŭ sia grandeco kaj pezo meteoro estas Aŭstralio.

Djufren supozas, ke sur tiu loko, kie troviĝas Aŭstralio, devis ekzisti antaŭe ia granda vulkana centro, kiu estis poste kovrita kaj neniigita per la falinta tien ĉi asteroido. Frohmann montras krom tio ankaŭ tion, ke la tera akso estas deklinita je 23° 28', kaj la centro de l' Aŭstralio kontinento ĝuste ankaŭ troviĝas sub 23:a grado de l' suda termezuro. Konsisto el ŝtonaj specoj, kiuj formas fundon de Aŭstralio, nenion diras kontraŭ la hipotezo pri ĝia meteora deveno. Se oni akceptas tiun ĉi hipotezon, ĉiuj anomalioj, kiujn prezentas la Aŭstralia kontinento, fariĝas klarigeblaj kaj perdas sian enigmecon. Kompreneble, nenia imago povas prezenti al si la pentrajon de tiu terura tremado, kiun devis elprovi la tero en la momento de falo de tia asteroido. La katastrofo devis esti laŭvere terura, en plena senco de tiu ĉi vorto, ĉar terura ĉion ekstermanta uragano devis traflugi laŭ la tuta suprajo de l' tero, kaj oceanaj ondoj de gigantaj mezuroj devis leviĝi kaj superakvigi la teron de l' suda duonglobo. Ĉe tio ĉi, kompreneble, devis formiĝi grandega maso da akvaj vaporoj, ĉar la falado fariĝis en oceanon, kaj tiuj ĉi vaporoj falis post tio sur teron en formo de pluvaj fluoj. Kiel postsigno de tiu ĉi katastrofo aperis kliniĝo de l' tera akso kaj la elvokitaj per tio ĉi šanĝoj de klimato sur la tera globo; ĉe l' polusoj aperis eternaj glacioj. Per tia maniero la nova hipotezo pri la deveno de Aŭstralio ne sole ne kontraŭparolas al faktoj, konfirmitaj per la scienco, sed eĉ klarigas multajn aperojn de l' pasinta kaj nuna vivo de l' tero, kiuj sen tiu ĉi hipotezo šajnas al ni enigmaj kaj ne kompreneblaj.

Tradukis **Al. Semenov.**

LA HIGIENAJ ORDONOJ KONSISTIGAS PER SI MEM TUTAN MORALON

EL "SENNACIULO"

Oni ne povas kontraŭdiri, ke la moralo, en tiu ĉi momento, trapasas krizon. Se la religiaj moraloj sufiĉas al la homoj, kiujn instigas sincera kredo, la liberpensuloj, kies nombro estas kreskanta, deziras, ke la moralo havu pozitivan bazon, racian, kiu širmus ĝiajn ordonojn kontraŭ la dubo kaj la diskuto.

Aliparte, ĉar la religiaj moraloj ne plu estas instruataj en la lernejoj, la bezono urĝe prezentigas, en la demokratioj, kiuj aspiras la laikecon, anstataŭigi tiun ĉi instruadon per tiu de civila moralo.

Nenia socio povos vivi sen moralo.

Sed kio povus vere esti civila moralo, en niaj socioj, kiujn superregas kaj orientas la scienco, krom scienca moralo, kiu bazigas ne sur principoj per aŭtoritato truditaj, sed sur veroj elmontritaj per la observado kaj per la sperto?

Nu, aperas, ke la naturscienco, la medicinaj scienco, la fiziologio inter ĉiuj, formas kun ĉiu paŝo, kiel praktikajn konkludojn, leĝojn, kiujn ili malkovras, principojn, kiuj estas precize kondukreguloj prezentindaj al la civilizita homo, en liaj rilatoj kun siaspeculoj.

Oni trovas tiel en la sciencoj tiujn ĉi solidajn bazojn, kiujn la malnovaj moraloj kredis trovi en la dogmoj.

Aliparte estas vero apenaŭ kontraŭdirebla, kaj treege rekuraĝiga de la egaleca vidpunkto, ke la sano estas la plej granda el la bonoj. Nek la potenco, nek la riĉoj, povus havigi saman senton de bonstato, ni diru saman feliĉon, kian havigas la sano.

Ĉu la sano ne kunliveras ankaŭ, kun tiu ĉi sentaĵo de l' feliĉo vivi, la plej grandan laborkapablon kaj produktkapablon? Kaj ĉu la fizika sano ne estas krome la kondiĉo por tiu ĉi morala sano, kiu malkonas ĉiujn degenerojn, ĉiujn psikajn difektojn, tieldire ĉiujn malvirtojn, ĉiujn malsanecajn impulsojn, komence de la simpla malkontento pri sia sorto ĝis la krimo?

Ĉar, ĉe la homo, la fiziko kaj la psiko estas intime ligitaj. Ili funkcias en malvasta dependeco unu de l' alia.

Neniaokaze, do, ĉe l' normala estaĵo, la korpo kaj la spirito povos, malgraŭ kelkaj ŝajnaj aspektoj, esti en reala opozicio.

La dieto, kiu konvenas al unu, devas konveni ankaŭ al la alia. La higieno de l' korpo devas esti ankaŭ la higieno de l' spirito.

Kaj en tiu ĉi senco moralo bazita sur la higieno devas esti rigardata, kiel moralo kompleta kaj perfekta, entenanta ĉiujn devojn de l' homo kontraŭ si mem kaj kontraŭ siaj samspeculoj.

Efektive ĝuste en la demandoj pri l' publika higieno precipe sentiĝas kun akuto la morala respondeco. Oni prenu, por konvinkiĝi, la banalan kazon de forkaŝo de infektmalsano, de kie povos rezulti epidemio, kiu postulos eble milojn da viktimoj.

Ĉu ekzistas pli bona ekzemplo prezentebla, por komprenigi, ke la plej bona rimedo labori por sia bonfarto estas krome labori por la bonfarto de l' aliaj? Ĉar tiel, anstataŭ esti sola por labori por si, okazas, ke ĉiuj laboras por ĉiu. Tiel la higieno ne devas esti konsiderata sole kiel la moralo de l' korpo.

Ampleksante ĉiujn kondutregulojn, kiuj povas modifi la vivpovon, tio volas diri, la valoron de l' najbaro, la higieno fakte estas la tuta moralo.

La fiziologio instruas al ni, ke la korpo estas maŝino, kiu povas esti tenata en bona stato, kiel okazas pri ĉiuj maŝinoj, nur per la laboro. Kaj la higieno, per siaj reguloj rilataj al la vivo de l' individuo kaj la vivo de l' kolektivoj, instruas al ni, kiele ni povos certigi al la homa maŝino sian plej bonan produktoforton kaj sian plej longan daŭron. Ĝi diras al ni plie, kiel ankaŭ estas eble al gepatroj naskigi infanojn, kiuj estos siavice rezistemaj kaj produktemaj maŝinoj.

Siaflanke, montrante al ni, kiel la individuo estas la produkto de sia medio, la scienco indikas la punktojn, kien devos trafi la klopodoj de l' leĝdonantoj, se ili volas realigi la kondiĉojn de l' bona intelekta kulturo, kiu dependas tiom, se ne pli, de la naturo de l' tereno, kiom de la kvalito de l' semo.

Entute, la higieno ordonas al la homo zorgi pri sia sano kaj pri tiu de la siaspeculoj. Ĝi ordonas al li labori, kaj indikas la plej bonajn laborkondiĉojn. Ĝi montras al li la vantecon kaj la danĝeron de l' plezuroj, en kiuj la homoj serĉas senutile la feliĉon, en trompe loga celado, kiu foruzas ilin. Ĝi prezentas al li la sanon kiel la solan realan feliĉon.

Kaj precipe ĝi pruvas al li, ke en tiu ĉi lukto pro la sano, ĉiuj suferas pro la eraroj de ĉiu, kaj ke tiel intima solidareco unuigas kaj kunigas ĉiujn membrojn de kolektivo.

De tie sekvas serio da devoj de l' individuo kontraŭ si mem kaj kontraŭ la aliaj. tuta serio da ordonoj signitaj per karaktero de nepreco, tute same rigoraj en sia formo kiel tiuj de l' religiaj moraloj. Ilia sankcio estas proksima, rekta, tuŝebla, neevitebla kaj ne elaĉetebla per ia ajn kompromiso.

En higieno ĉiu eraro pagiĝas, kaj ĉiu krimo spertas sian punigon, same fatale kiel aplikiĝas la pezoforto. Kaj tia estas vere la karaktero de naturdoktrino ĝuste morala, kiu devas eviti ĉian marĉandon, ĉian senfortigon de l' konscienco! Kaj ĝuste per tiu ĉi karaktero ĉi tiu moralo de l' estonto montriĝos supera al la religiaj moraloj.

Doktoro Henikur (Hericourt) Trad. el la franca N B.



PRI KAŬZECO.

EL "SENNACIULO"

Jam de antikva tempo la Budhismo konceptis, ke en la universo regas la leĝo de kaŭzeco, t. e. la principo de **karma**. Nune ankaŭ ni sciencistoj kredas, ke ĉio sin trovas inter la ĉeneroj de kaŭzo kaj rezulto.

La "karma" ne science solvas la rilaton. Ĝisnuna scienco ankaŭ ne sufiĉe klarigas ĝin. Antaŭ kelkaj jaroj PAVLOV el Leningrad instruis al ni la fenomenon de kondiĉita reflekso. Mi volas pligrandigi tiun ĉi ideon kaj klarigi ĉiun rilaton, kiun fiziko kaj ĥemio ne povas solvi.

Laŭ mia opinio, oni povas dividi kaŭzecon en du specojn: la leĝon de kaŭzeco konstanta kaj tiun de hazarda. La leĝo de kaŭzeco konstanta estas absoluta, ne ŝanĝebla, la sama kaŭzo venigas ĉiam la saman rezulton. Ekz. sub la aerpremo de 760 mm, la akvo boliĝas ce 100° C. kaj glaciiĝas ce 0° C. La fluidiĝa punkto de ĉiuj elementoj kaj ĥemiaj produktoj estas ankaŭ ĉiam speciala. La movado de planedoj, la interreakcio de ĥemiaĵoj, la kaŭza rilato de meteorologiaj fenomenoj ktp. ktp. estas konstantaj, matematike mezureblaj. Kontraŭe la leĝo de kaŭzeco hazarda estas ŝanĝebla laŭvole, ne matematike mezurebla. La sama kaŭzo venigas ne ĉiam la saman rezulton kaj la sama rezulto ne devenas de la sama kaŭzo. Ekz. vidante la saman floron, la unua ĝojus, la dua malĝojus kaj

la tria koleriĝus. Unu timas serpenton, sed ne araneon, la dua araneon, sed ne serpenton, kaj la tria nek serpenton nek araneon, sed ranon. Tia kaŭzeco estas tute alia ol la konstanta. Ĝi estis iam kondiĉita kaj fiksita. Ni ĉiuj havas emocion, sed la kondiĉo de ĝia apero tute malsimilas laŭ persono.

La vorto estas ankaŭ la produkto de la hazarda kaŭzeco. Ekz. kiam ni vidas la paperon, ni ĉiam aŭdas la sonon de papero. La vidimpreso estas tute sama al ĉiuj landanoj, sed la aŭdimpreso de la aĵo estas ne samaj laŭ rasoj, regnoj aŭ landoj. La interrilato inter vid- kaj aŭdimpresoj estas nur hazarda, sed delonge fiksita.

La penso estas aro da vortoj, kaj la aranĝmaniero de vortoj, t. e. la pensmaniero estas ankaŭ hazarde kondiĉita kaj fiksita. Unuvorte la intelekto estas rezulto de la hazarde kondiĉita kaŭzrilato ĉe la impresoj de niaj sentorganoj. Tial ni nur miras aŭ opinias stranga la okazintaĵon ne denaske alkutimigitan, dum ni opinias tute prava la fenomenon science ne klarigeblan, sed denaske alkutimigitan.

Do, oni devas esti sincera por krei novajn vortojn, kiuj ofte kondukas popolon al erarideo.

Nia personeco kaj karaktero estas plene fiksitaj de la funkcio de nelaŭvola nervsistemo, kiu emas reagi ĉiam kun tia sama tipo al iu speciala impreso aŭ koncepto, kia ĝi estis iam kondiĉita.

La vivaĵoj evoluadas tiel heredinte iom post iom la emon akiritan, kiun ĉiu raso konstatis taŭga por sia cirkonstanco dum la ĉeno de generacioj. La diverseco de maniero dependas de la instigo de cirkonstanco, klimato, kunvivaĵo ktp., precipe de la kaŭzeco, konstanta. Sed la malsimileco de la instinkto laŭrasa dependas de la hazarda kaŭzeco. Iuj praavoj de hirundoj estis devigitaj transflugi oceanon, kaj la emo fariĝis instinkto. Ŝafoj, kiuj estis devigataj vivi en la herbejo, akiris apetiton je herboj. Kameloj, kiuj estis devigataj vivi en la dezerto seka, povas konservi akvon en siaj stomakoj. Tiele la instinkto apetito estis tute hazarde kondiĉita.

La seksa instinkto estas ankaŭ pli malpli hazarde kondiĉita. Iuj incitiĝas pro speciala odoro, aliaj pro la vido kaj la triaj pro aŭdo. Ni homoj povas kontroli la seksan instinkton per la intelekto aŭ rezono, al ni la instinkto ne estas la absoluta ordono; ĝi dependas de la kaŭzeco hazarda kaj fiksita.

Ni povas laŭvole ŝanĝi la rilaton, por ke ĝi plej bone adaptiĝu al la socia stato. Ĉio estas sub la regado de la leĝo de kaŭzecoj konstanta kaj hazarda. Ni devas juĝi, ĉu la aĵo antaŭ ni aperanta koncernas — al kiu el la du leĝoj, kaj sintenadi tiel, kiel la leĝo ordonas nin.

Edukado de infanoj, socia idefluo kaj moralo rilatas al hazarda kondiĉo aŭ cirkonstanco. Pli-bonigu la kondiĉon kiel eble plej, do la socio homara pli altiĝus.

Hazime Asada, El "Revuo Kultura".



Eltiro el privata letero de D-ro Zamenhof al S-ro B.,

presita kun permeso de ambaŭ korespondantoj

Tradukis el lingvo rusa V. G.

EL "LINGVO INTERNACIA"

... Vi demandas min, kiel aperis ĉe mi la ideo krei lingvon internacian kaj kia estis la historio de la lingvo Esperanto de la momento de ĝia naskiĝo ĝis tiu ĉi tago? La tuta **publika** historio de la lingvo, t. e. komencante de la tago, kiam mi malkaŝe eliris kun ĝi, estas al Vi pli-malpli konata; cetere **tiun ĉi** periodon de la lingvo estas nun, pro multaj kaŭzoj, ankoraŭ neoportune tuŝadi; mi rakontos al Vi tial en komunaj trajtoj sole la historion de la **naskiĝo** de la lingvo.

Estos por mi malfacile rakonti al Vi ĉion tion ĉi detale, ĉar multon **mi** mem jam forgesis: la ideo, al kies efektivigo mi dediĉis tutan mian vivon, aperis ĉe mi — estas ridinde ĝin diri — en la plej frua infaneco kaj de tiu ĉi tempo neniam min forlasadis; mi vivis kun ĝi kaj eĉ ne povas imagi min sen ĝi. Tiu ĉi cirkonstanco parte klarigos al Vi, kial mi kun tiom da obstineco laboris super ĝi kaj kial mi, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj kaj maldolĉaĵoj, ne forlasadis tiun ĉi ideon, kiel ĝin faris multaj aliaj, laborintaj sur la sama kampo.

Mi naskiĝis en Bjelostoko, gubernio de Grodno. Tiu ĉi loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjelostoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj: rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj; ĉiu el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn elementojn. En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfelicon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikaj partoj. Oni edukadis min kiel idealiston; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole rusoj, poloj, germanoj, hebreoj k. t. p. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon, kvankam multaj eble ridetos pri tiu ĉi "doloro pro la mondo" ĉe la infano. Ĉar al mi tiam ŝajnis, ke la "grandaĝaj" posedas ian ĉiopovan forton, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon.

Iom post iom mi konvinkiĝis, kompreneble, ke ne ĉio fariĝas tiel facile, kiel ĝi prezentiĝas al la infano; unu post la alia mi forjetadis diversajn infanajn utopiojn, kaj nur la revon pri unu homa lingvo mi neniam povis forjeti. Malklare mi iel min tiris al ĝi, kvankam, kompreneble, sen iaj difinitaj planoj. Mi ne memoras kiam, sed en ĉia okazo sufiĉe frue, ĉe mi formiĝis la konscio, ke la sola lingvo povas esti nur ia neŭtrala, apartenanta al neniu el la nun vivantaj nacioj. Kiam el la Bjelostoka reala lernejo (tiam ĝi estis ankoraŭ gimnazio) mi transiris en la Varsovian duan klasikan gimnazion, mi dum kelka tempo estis forlogata de lingvoj antikvaj kaj revis pri tio, ke mi iam veturados en la tuta mondo kaj per flamaj paroloj inklinados la homojn revivigi unu el tiuj ĉi lingvoj por komuna uzado. Poste, mi ne memoras jam kiamaniere, mi venis al firma konvinko, ke tio ĉi estas

neebla, kaj mi komencis malklare revi pri **nova,** arta lingvo. Mi ofte tiam komencadis iajn provojn, elpensadis artifikajn riĉegajn deklinaciojn kaj konjugaciojn, k. t. p. Sed homa lingvo kun ĝia, kiel ŝajnis al mi, senfina amaso da gramatikaj formoj, kun ĝiaj centoj da miloj de vortoj, per kiuj min timigis la dikaj vortaroj, ŝajnis al mi tia artifika kaj kolosa maŝino, ke mi ne unufoje diradis al mi: "for la revojn! tiu ĉi laboro ne estas laŭ homaj fortoj",—kaj tamen mi ĉiam revenadis al mia revo.

Germanan kaj francan lingvojn mi ellernadis en infaneco, kiam oni ne povas ankoraŭ kompari kaj fari konkludojn; sed kiam, estante en la 5-a klaso de gimnazio, mi komencis ellernadi la lingvon anglan, la simpleco de la angla gramatiko jetiĝis en miajn okulojn, precipe dank' al la kruta transiro al ĝi de la gramatikoj latina kaj greka. Mi rimarkis tiam, ke la riĉeco de gramatikaj formoj estas nur blinda historia okazo, sed ne estas necesa por la lingvo. Sub tia influo mi komencis serĉi en la lingvo kaj forjetadi la senbezonajn formojn, kaj mi rimarkis, ke la gramatiko ĉiam pli kaj pli degelas en miaj manoj, kaj baldaŭ mi venis al la gramatiko plej malgranda, kiu okupis sen malutilo por la lingvo ne pli ol kelkajn paĝojn. Tiam mi komencis pli serioze fordoniĝi al mia revo. Sed la grandegulaj vortaroj ĉiam ankoraŭ ne lasadis min trankvila.

Unu fojon, kiam mi estis en la 6-a aŭ 7-a klaso de la gimnazio, mi okaze turnis la atenton al la surskribo "Svejcarskaja", kiun mi jam multajn fojojn vidis, kaj poste al la elpendajo "Konditor-**skaja**". Tiu ĉi **"skaja"** ekinteresis min kaj montris al mi, ke la sufiksoj donas la eblon el unu vorto fari aliajn vortojn, kiujn oni ne devas aparte ellernadi. Tiu ĉi penso ekposedis min tute, kaj mi subite eksentis la teron sub la piedoj. Sur la terurajn grandegulajn vortarojn falis radio de lumo, kaj ili komencis rapide malgrandiĝi antaŭ miaj okuloj.

"La problemo estas solvita!"—diris mi tiam. Mi kaptis la ideon pri sufiksoj kaj komencis multe labori en tiu ĉi direkto. Mi komprenis, kian grandan signifon povas havi por la lingvo konscie kreata la plena uzado de tiu forto, kiu en lingvoj naturaj efikis nur parte, blinde, neregule kaj neplene. Mi komencis kompari vortojn, serĉi inter ili konstantajn, difinitajn rilatojn kaj ĉiutage mi forjetadis el la vortaro novan grandegan serion da vortoj, anstataŭigante tiun ĉi grandegon per unu sufikso, kiu signifis certan rilaton. Mi rimarkis tiam, ke tre granda amaso da vortoj pure **radikaj** (ekz. "patrino", "mallarĝa", "tranĉilo" k. t.p.) povas esti facile transformitaj en vortojn **formitajn** kaj malaperi el la vortaro. La mehaniko de la lingvo estas antaŭ mi kvazaŭ sur la manplato, kaj mi nun komencis jam labori regule, kun amo kaj espero. Baldaŭ post tio mi jam havis skribitan la tutan gramatikon kaj malgrandan vortaron.

Tie ĉi mi diros ĝustatempe kelkajn vortojn pri la materialo por la vortaro. Multe pli frue, kiam mi serĉis kaj eljetadis ĉion senbezonan el la gramatiko, mi deziris uzi la principojn de la ekonomio ankaŭ por la vortoj kaj, konvinkita, ke estas tute egale, kian formon havos tiu aŭ alia vorto, se ni nur **konsentos,** ke ĝi esprimas la donitan ideon, mi simple **elpensadis** vortojn, penante, ke ili estu kiel eble plĭ mallongaj kaj ne havu senbezonan nombron da literoj. Mi diris al mi, ke anstataŭ ia 11-litera "interparoli" ni tute bone povas esprimi la saman ideon per ia ekz. 2-litera "pa". Tial mi simple skribis la matematikan serion da plej mallongaj, sed facile elparoleblaj kunigoj de literoj kaj al ĉiu el ili mi donis la signifon de difinita vorto (**ekz. a, ab, ac, ad,... ba, ca, da,... e, eb, ec,... be, ce, ... aba, aca,...** k. t. p.) Sed tiun ĉi penson mi tuj forjetis, ĉar la provoj kun mi mem montris al mi, ke tiaj elpensitaj vortoj estas tre malfacile ellerneblaj kaj ankoraŭ pli malfacile memoreblaj. Jam tiam mi konvinkiĝis, ke la materialo por la vortaro devas esti romana-germana, ŝanĝita nur tiom, kiom ĝin postulas la reguleco kaj aliaj gravaj kondiĉoj de la lingvo. Estante jam sur tiu ĉi tero, mi baldaŭ rimarkis, ke la nunaj lingvoj posedas grandegan provizon da pretaj jam vortoj internaciaj, kiuj estas konataj al ĉiuj popoloj kaj faras trezoron por estonta lingvo internacia,—kaj mi kompreneble utiligis tiun ĉi trezoron.

En la jaro 1878 la lingvo estis jam pli-malpli preta, kvankam inter la tiama "lingwe uniwersala" kaj la nuna Esperanto estis ankoraŭ granda diferenco. Mi komunikis pri ĝi al miaj kolegoj (mi estis tiam en 8-a klaso de la gimnazio). La plimulto da ili estis forlogitaj de la ideo kaj de la frapinta ilin neordinara facileco de la lingvo, kaj komencis ĝin ellernadi. La 5-an de decembro 1878 ni ĉiuj kune solene festis la sanktigon de la lingvo. Dum tiu ĉi festo estis paroloj en la nova lingvo, kaj ni entuziasme kantis la himnon, kies komencaj vortoj estis la sekvantaj:

"Malamikete de las nacjes
Kadó, kadó, jam temp' está!
La tot' homoze in familje
Konunigare so debá."

(En la nuna Esperanto tio ĉi signifas: "Malamikeco de la nacioj falu, falu, jam tempo estas! La tuta homaro en familion unuiĝi devas.")

Sur la tablo, krom la gramatiko kaj vortaro, kušis kelkaj tradukoj en la nova lingvo.

Tiel finiĝis la unua periodo de la lingvo. Mi estis tiam ankoraŭ tro juna por eliri publike kun mia laboro, kaj mi decidis atendi ankoraŭ 5—6 jarojn kaj dum tiu ĉi tempo zorgeme elprovi la lingvon kaj plene prilabori ĝin praktike. Post duonjaro post la festo de 5-a de decembro ni finis la gimnazian kurson kaj disiris. La estontaj apostoloj de la lingvo provis paroleti pri "nova lingvo" kaj, renkontinte la mokojn de homoj maturaj, ili tuj rapidis malkonfesi la lingvon, kaj mi restis tute sola. Antaŭvidante nur mokojn kaj persekutojn, mi decidis kaŝi antaŭ ĉiuj mian laboron. Dum 5½ jaroj de mia estado en universitato, mi neniam parolis kun iu pri mia afero. Tiu ĉi tempo estis por mi tre malfacila. La kaŝeco turmentis min; devigita zorgeme kaŝadi miajn pensojn kaj planojn mi preskaŭ nenie estadis, en nenio partoprenadis, kaj la plej bela tempo de la vivo—la jaroj de studento—pasis por mi plej malgaje. Mi provis iafoje min distri en la societo, sed sentis min ia fremdulo, sopiris kaj foriradis, kaj de tempo al tempo faciligadis mian koron per ia versaĵo en la lingvo, prilaborata de mi. Unu el tiuj ĉi versaĵoj ("Mia penso") mi metis poste en la unuan eldontan de mi broŝuron; sed al la legantoj, kiuj ne sciis,

ĉe kiaj cirkonstancoj tiu ĉi versajo estis skribita, ĝi eksajnis, kompreneble, stranga kaj nekompreneblа.

Dum ses jaroj mi laboris perfektigante kaj provante la lingvon,—kaj mi havis sufiĉe da laboro, kvankam en la jaro 1878 al mi ŝajnis, ke la lingvo jam estas tute preta. Mi multe tradukadis en mian lingvon, skribis en ĝi verkojn originalajn, kaj vastaj provoj montris al mi, ke tio, kio ŝajnis al mi tute preta teorie, estas ankoraŭ ne preta praktike. Multon mi devis ĉirkaŭhaki, anstataŭigi, korekti kaj radike transformi. Vortoj kaj formoj, principoj kaj postuloj puŝis kaj malhelpis unu la alian, dume en la teorio, ĉio aparte kaj en mallongaj provoj, ili ŝajnis al mi tute bonaj. Tiaj objektoj, kiel ekz. la universala prepozicio "je", la elasta verbo "meti", la neŭtrala, sed difinita finiĝo "aŭ" k. t. p. kredeble neniam enfalus en mian kapon teorie. Kelkaj formoj, kiuj ŝajnis al mi riĉaĵo, montriĝis nun en la praktiko senbezona balasto; tiel ekz. mi devis forjeti kelkajn nebezonajn sufiksojn. En la jaro 1878 al mi ŝajnis, ke estas al la lingvo sufiĉe havi gramatikon kaj vortaron; la multpezecon kaj malgraciecon de la lingvo mi alskribadis nur al tio, ke mi ankoraŭ ne sufiĉe bone ĝin posedas; la praktiko do ĉiam pli kaj pli konvinkadis min, ke la lingvo bezonas ankoraŭ ian nekaptеblan "ion", la kunliganta elementon, donantan al la lingvo vivon kaj difinitan, tute formitan **"spiriton"**. (La nesciado de la spirito de la lingvo estas la kaŭzo, kial kelkaj esperantistoj, tre malmulte legintaj en la lingvo Esperanto, skribas senerare, sed en multepeza, malagrabla stilo,—dume la esperantistoj pli spertaj skribas en la stilo bona kaj tute **egala**, al kiu ajn nacio ili apartenas. La spirito de la lingvo sendube kun la tempo multe, kvankam iom post iom kaj nerimarkite, ŝanĝiĝos; sed se la unuaj esperantistoj, homoj de diversaj nacioj, ne renkontus en la lingvo tute difinitan **fundamentan** spiriton, ĉiu komencus tiri en sian flankon kaj la lingvo restus eterne, aŭ almenaŭ dum tre longa tempo, malgracia kaj senviva koleкto da vortoj.)—Mi komencis tiam evitadi laŭvortajn tradukojn el tiu aŭ alia lingvo kaj penis rekte **pensi** en la lingvo neŭtrala. Poste mi rimarkis, ke la lingvo en miaj manoj ĉesas jam esti senfundamenta ombro de tiu aŭ alia lingvo, kun kiu mi havas la aferon en tiu aŭ alia minuto, kaj ricevas sian propran vivon, la propran difinitan kaj klare esprimitan fizionomion, ne dependantan jam de iaj influoj. La parolo fluis jam mem, flekseble, gracie kaj tute libere, kiel la viva patra lingvo.

Ankoraŭ unu cirkonstanco igis min por longa tempo prokrasti mian publikan eliron kun la lingvo: dum longa tempo restis nesolvita unu problemo, kiu havas grandegan signifon por neŭtrala lingvo. Mi sciis, ke ĉiu diros al mi: "Via lingvo estos por mi utila nur tiam, kiam la tuta mondo ĝin akceptos; tial mi ne povas ĝin akcepti ĝis tiam, kiam ĝin akceptos la tuta mondo". Sed ĉar la "mondo" ne estas ebla sen antaŭaj apartaj "unuoj", la neŭtrala lingvo ne povis havi estontecon ĝis tiam, kiam prosperos fari ĝian utilon por ĉiu aparta persono sendependa de tio, ĉu jam estas la lingvo akceptita de la mondo aŭ ne. Pri tiu ĉi problemo mi longe pensis. Fine la tiel nomataj sekretaj alfabetoj, kiuj ne postulas, ke la mondo antaŭe ilin akceptu, kaj donas al tute nedediĉita adresato la eblon kompreni ĉion skribitan de vi, se vi nur transdonas al la adresato la ŝlosilon,—alkondukis min al la penso aranĝi ankaŭ la lingvon en la maniero de tia "ŝlosilo", kiu, enhavante en si ne sole la tutan vortaron, sed ankaŭ la tutan gramatikon en la formo de apartaj, tute memstaraj kaj alfabete ordigitaj elementoj, donus la eblon al la tute nedediĉita adresato de kia ajn nacio tuj kompreni vian leteron.

Mi finis la universitaton kaj komencis mian medicinan praktikon. Nun mi komencis jam pensi pri la publika eliro kun mia laboro. Mi pretigis la manuskripton de mia unua broŝuro ("D-ro Esperanto. Lingvo internacia. Antaŭparolo kaj plena lernolibro") kaj komencis serĉi eldonanton. Sed tie ĉi mi la unuan fojon renkontis la maldoĉan praktikon de la vivo, la financan demandon, kun kiu mi poste ankoraŭ multe devis kaj devas forte batali. Dum du jaroj mi vane serĉis eldonanton. Kiam mi jam trovis unu, li dum duonjaro pretigis mian broŝuron por eldono kaj fine—rifuzis. Fine, post longaj klopodoj, mi prosperis mem eldoni mian unuan broŝuron en julio de la jaro 1887. Mi estis tre ekscitita antaŭ tio ĉi; mi sentis, ke mi staras antaŭ Rubikono kaj ke de la tago, kiam aperos mia broŝuro, mi jam ne havos la eblon reiri; mi sciis, kia sorto atendas kuraciston, kiu dependas de la publiko, se tiu ĉi publiko vidas en li fantaziulon, homon, kiu sin okupas je "flankaj aferoj"; mi sentis, ke mi metas sur la karton la tutan estontan trankvilecon kaj ekzistadon mian kaj de mia familio: sed mi ne povis forlasi la ideon, kiu eniris mian korpon kaj sangon kaj... mi transiris Rubikonon.

Lazaro Ludoviko Zamenhof.

REGULECO KAJ UNUFORMECO.

EL "LINGVO INTERNACIA"

En la Marta numero, finante la artikolon "El Francujo", mi diris: "Ni ne devas forgesi, ke lingvo internacia ne estas precipe farita por la instruituloj aŭ scienculoj, kiuj ĝin apenaŭ bezonas; ĝi estas unue kaj speciale farita por la meze instruitaj homoj. Sed tiuj ĉi ne povas diveni multe da vortoj, tre facile komprenataj de klerulo. La vortaro estas do por ili sola rimedo de kompreno. Sed, se ni uzos formojn aŭ vortojn eksteraj n, kiujn oni ne trovas en niaj libroj, per kia maniero ni volas, ke ili komprenu?"

Amikoj, havu la bonecon pardoni al mi tiun ĉi ripeton, sed ĝi estas necesa enkonduko al tio, kion mi tuj diros.

Por tute klarigi la pensojn esprimitajn supre, ni prenu praktikajn ekzemplojn. Samtempe ni vidos, ĉu oni estas prava kredante pli bonan la formon aŭ vorton personan, per kiu oni dekliniĝas de Esperanta stilo absolute regula.

"Ed" estas pli internacia ol "kaj", pretendos iu. Mi ne trovas. Efektive, "kaj" estas uzata en **unu** lingvo regule; "ed" estas uzata en unu alia escepte. Sed vi diros, ke "ed" rememorigas la latinan kaj francan "et"; mi konsentas por homo scianta unu el tiuj du lingvoj. Sed ĉu Esperanto estos ellernata nur de personoj konantaj la latinan aŭ la

francan lingvon? Kiel do faros la aliaj? Ili serĉos vian "ed" en la vortaro, kaj ne trovante ĝin ili ne komprenos.

Tiel same kiel vi juĝas "ed" pli internacian ol "kaj", mi povas trovi "il", "nos", "vos", "kvande", pli intenciaj ol "li", "ni", "vi", "kiam", kaj mi havas la rajton kredi, ke oni min komprenos, se, uuigante vian "ed" kun miaj pronomoj, mi faros la simplan frazon sekvantan: "Kvande nos koleris vos ĝojis ed kantis kun il". Sed donu ĝin al Anglo, al Germano, al Ruso, scianta˛ nur ilian patran lingvon, kaj vi vidos ĉu ili komprenos. Tamen mi uzis elementojn internaciajn. Mi ne finis. En mia frazo iu povus tre bone ŝanĝi "koleris, ĝojis, kantis", per "iraskis, gaŭdis, ĉantis" trovante, ke tiuj vortoj estas preferindaj pro tiu aŭ alia motivo. Sed tiam homo neklera nenion pli komprenos en ĝi, niaj lernolibroj enhavante nenian el ĝiaj vortoj.

Nu, amikoj, kion mi faris en unu frazo, tion ni povos fari nesenteble en la tuta lingvo per almikso kaj anstataŭigo de formoj aŭ vortoj personaj. Ĉu ni deziras atingi rapide la antikvan Babelan konfuzon? Ĉu ni volas, ke nia lingvo disbranĉiĝu en multego da dialektoj aŭ pli ĝuste da jargonoj nur kompreneblaj al iliaj aŭtoroj?

Ne, certe ne. Ni do evitu severe ĉiun volan neregulaĵon en nia stilo. Ni oferu por la bono de nia afero ĉiun nacian, lingvistan aŭ personan preferon kaj ni uzu Esperanton tian kiel ĝi estas, eĉ en niaj privataj leteroj. Sed ni ekzamenu iom ankoraŭ la demandon.

Estas pli simple, diros iu, tute forĵeti la akuzativon. Ha!—ni vidu. Kiel vi markos la diferencon inter "li saltas sur la tablo" kaj "li saltas sur la tablon"; inter "ŝi amas min pli ol li" kaj "ŝi amas min pli ol lin?" Vi diros simple "ŝi amas mi pli ol li" en ĉiu okazo, sen ia akuzativo. Sed ĉu vi kredas ke oni tre klare divenos kion vi volis diri? Kaj ankaŭ kiel vi esprimos nekonfuzeble la diferencon inter "Kiun mi vidas?" kaj "Kiu min vidas?"

Por forĵeti la akuzativon kaj resti logika kaj klara, oni devus meti du formojn por kelkaj pronomoj kaj kelkaj prepozicioj. Ni devus do elekti inter du formoj kiel ni elektas inter du kazoj. La plisimpligo ne ŝajnas al mi videbla.

Krom tio, per tia eljeto ni forprenus el la lingvo mirindan flekseblecon por la esprimado de l' penso kaj la fidela traduko de multaj tekstoj. Fine vi devus difini regulojn por certaj aranĝoj de vortoj, kaj tiam ni komplikus kaj ne simpligus nian lingvon.

Skribante tion, mi intencas nur turni la atenton de ĉiuj sur la necesecon esti regulaj kaj unuformaj en nia stilo kaj mi ne povas fini pli bone ol per la vortoj mem de nia kara doktoro: "Lingvo estas **pure kondiĉa signado de ideoj**, kiu povas plenumi sian difinon nur tiam, se ĉiuj uzas ĝin **severe egale**,—alie ĝi perdas ĉian sian sencon kaj celon kaj servas ne al reciproka kompreniĝado, sed nur al malkompreniĝado."

L. de Beaufront.

SKIZO DE KLASIGO DE TIUJ, KIUJ SIN DEDIĈAS AL ESPERANTO

Citi ĉi tie detale ĉiujn kaŭzojn, motivojn, kialojn pro kiuj oni sin dediĉas ordinare al Esperanto estas kompreneble nefacila afero. Pli malfacile ankoraŭ estus enklasigi la Esperantistojn en apartajn kategoriojn laŭ ilia persona merito kaj fervoro. Ni do limigos nin denombri de ili nur la plej oftajn, la plej konatajn tipojn.

Ĉiu persono kiu sin okupas pri Esperanto, havas pri tio sian propran historion. Pro tio oni ofte legas en Esperantistaj jurnaloj artikolojn sub la rubriko: „Kial (aŭ kiel) mi fariĝis Esperantisto?" Estus do laŭ ni dezirinde, ke tiaj artikoloj, tiel interesaj kiel instruigaj, pli kaj pli plimultiĝu en la tutmonda Esperantista gazetaro.

1. Unuj sin okupas pri Esperanto nur por nuntempiĝi, ekzakte kiel oni farus por la lasta modo aŭ nova danco. Ili hazarde legis en enlanda jurnalo artikolon pri la mondlingvo kaj pensas en si mem, ke estus honte, ke ili nenion sciu pri tia afero se okaze ĝi estus pritraktota en iu de ili vizitata medio. Tiaj personoj formas ordinare nebonan materialon por nia hodiaŭa armeo; ili estas frivolaj por ĉio kiel ankaŭ por Esperanto, sekve ĉstas superflue pli longe paroli pri ili.

2. Aliaj sin okupas pri la mondlingvo pro simpla scivolo. „Kio do povas esti Esperanto?" ili sin diras, „Ni vidu! ĉionkonsiderante ni nenion riskas! se ĝi plaĉas al ni, bone, ni daŭrigas, se ne, ni retiriĝas."

Por tiaj dubantoj, kaj estas multaj, dependas ofte de la lerteco de la iniciatinto, ke ili estu gajnitaj al nia afero. Foje ili estas logataj kiel fiŝoj en naso, el kiu estas malfacile eliri kvankam ĝia elirejo, kiu servis por la eniro restas je la supera parto senĉese malfermegita.

3. Alian kategorion starigas tiuj, kiuj sin dediĉante al la „Dua lingvo per ĉiuj" celas eltiri nur materialan profiton kaj nenion plu, konforme al la konata maksimo: „La celo sanktigas la rimedojn."

Tiaj individuoj plenaj je egoismo evitas ordinare: aliĝi al enlanda Esperantó-Grupo, aboni al Esperantista jurnalo kaj ia ajn maniere helpi la disvastigon de nia movado. Ĉiuokaze ili formas sufiĉe grandan kontingenton en nia anaro kvankam ili estas por ni de malgranda valoro.

4. Aliaj sin okupas pri la Lingvo Internacia, ĉar ili ne havis la okazon lerni fremdan lingvon kaj trovas, ke nuntempe oni ne povas vivi nur kun sia gepatra lingvo precipe se tiu ĉi apartenas al malgranda nacio. „Unu aŭ alimaniere", ili pensas, "tia Dua lingvo povus eble utili al ni". Ili do sin dediĉas al ĝi, ne kalkulante tamen la specialan econ, kiun posedas Esperanto alproprigi ofte al si indiferentulojn. Tiel iom post iom la asimilo okazas kaj la novuloj estas firme kaptataj kiel birdoj sur glukaptilo. Tie ili sin sentas bonfarte kaj tute ne volas plu malgluiĝi; ili restas tie por ĉiam! En ĉi tiu kontingento oni ofte trovas bonajn Esperantistojn.

5. Al kvina kategorio oni povus grupigi tiujn, kiuj sin dediĉinte al la ellerno de fremdaj lingvoj, sed malsukcese pro ilia malfacileco, klopodas anstataŭigi ilin almenaŭ per Esperanto, kiu, laŭdire, estas multe pli facila ol la naciaj lingvoj. Do pri lernado de lingvoj, kiel oni scias, post plena ellerno de fremda lingvo, gusto por tria lingvo akcentiĝas. Inter tiuj Esperantistoj oni renkontas kelkfoje bonajn samideanojn.

6. Al sesa kategorio apartenas ĉiuj lernemuloj. Ili jam scipovas fremdajn lingvojn kaj deziras aldoni unu ankoraŭ al iliaj lingvaj konoj, kaj ĉar la plej granda parto de la radikoj estas jam al ili konataj, ili ne renkontas malfacilecon por ellerni ankaŭ Esperanton. Tiuj ĉi farigas ordinare tre bonaj Esperantistoj, ĉar pro la antaŭa ellerno de alinaciaj lingvoj jam sin pretigis, tiel diri, por la internacia spirito kaj kiam poste ili sciigas la veran celon de Esperanto, la grundo prezentiĝas favora por la kulturado de la Interna ideo de nia afero.

7. Al sepa grupo apartenas la monaviduloj, kaj ofte oni aŭdas de ili jenan rekantaĉon: „Ĉu Esperanto gajnigas monon? Pardonu", ili daŭrigas, kredante sin senkulpigi, "sed niaj vivrimedoj ne estas prosperaj, kaj kiel vi povas juĝi: „primum vivere deinde philosophare" (vivi antaŭ ĉio kaj poste filozofi). Por tiaj personoj oni estus tentinta sin montri indulgaj, sed malprave! La neagemo mortigas la homon; batali kaj ĉiam batali por la vivo, jen la beleco, la valoro, la celo de la vivo. Por ĉio oni trovas la tempon, sufiĉas voli, kaj plej ofte: voli estas povi. Oni devas kutimiĝi al la malfavoraj cirkonstancoj per daŭra kaj peniga laboro, la peno ne devas esti mezurata por tiu, kiu volas sukcesi. Ĉu ili pretekstas mankon de sufiĉaj vivrimedoj? Despli prave! Oni devas sin pretigi por la vivbatalo per ĉiu akirebla rimedo; foje oni ne scias kiu el ili kondukos vin al pli bona stato. Jen rilata ekzemplo por konfirmo de nia aserto: Antaŭ nelonge estis organizita konkurso por la akiro de ofico en granda Banko. Multaj kandidatoj sin prezentis, kiuj krom aliaj demandoj devis ankaŭ traduki tekston el la nacia lingvo al ĉiuj de la kandidatoj konataj lingvoj. Inter ili troviĝis hazarde Esperantisto. Do krom la fremdaj lingvoj kiujn la aliaj konkurantoj ankaŭ scipovis kiel li, nia samideano uzis plie Esperanton. Vi divenas certe, kio okazis. Nia samcelano sukcesis finakiri la deziratan postenon. En tiu ĉi okazo oni rajtus renversi la ordon de la latina maksimo, jene: „Primum philosophare deinde vivere" se tamen: sin dediĉi al Esperanto estas filozofi!

8. En alian kategorion oni povus grupigi la studemajn kaj spritajn intelektulojn, kiuj tre ĝuste, konsideras, ke la interŝanĝo de la intelekta laboro estas nepre necesa rimedo por la konservado de la spiritsaneco. Efektive la filozofo kaj la matematikisto, la intelektulo kaj la financisto devas momente kvietiĝi apaŝante de unu temlaboro al alia, ekzakte kiel faras la ŝarĝoportisto, kiu transportante pezan ŝarĝon ŝangas de tempo al tempo manon aŭ ŝultron de la pezo; aŭ la presisto, kiu preferas nedaŭre labori per la samaj presliteroj. La varieco en la intelekta laboro estas la ĉefa faktoro, kiu se ĝi ne kondukas ĉiam al plena ripozo, almenaŭ ĝi malpliigas kaj malfruigas la trolaciĝon. Krom tio „Kiel provizon de via maljuneco" diris la fama Helena filozofo kaj poeto Pitakos, „rezervu la instruitecon, ĉar ĝi estas la plej bona konsolo kiu vin helpos por facile elteni pli malfrue la malfacilajojn de la maljuneco". Tiuj Esperantistoj, kvankam malmultaj, tamen ili estas bonaj samideanoj kaj faras grandan servon al nia movado. Ili sin altrudas al la skeptika publiko se ne ĉiam pro ilia agemeco almenaŭ pro ilia persona valoro, pro ilia famo.

9. Fine al naŭa kaj lasta kategorio oni povas grupigi la verajn idealistojn, kiuj por atingi la celon de sia idealismo povus sin dediĉi ne nur al la ellerno de lingvo, kiel nia kara Esperanto, sed ankoraŭ al la plej malfacilaj taskoj, ĉar eksentante la sanktan devon, kiun ili intencas plenumi, ili plifortigas sian volon kaj pligrandigas sian klopodon. Tiuj ĉi estas la pioniroj de nia ideo, la kondukantoj de nia Esperantista pacama armeo! Ili laboras senprofite. Ili elspezas monon laŭpove kaj senkalkule. Ili ĉie kaj ĉiam ne hontas surporti la simbolon de Esperantismo. La eco de pioniro, la trezoro de idealisto konistas el lia koro, el kiu konstante elŝprucas lia neelĉerpebla, lia senĉesa, lia senfina agemeco kaj kuraĝo.

Ni sincere salutu ĉiujn samideanojn de la Esperantista mikrokosmo (Mondeto), al kiu ajn kategorio ili apartenas, sed por tiuj, kiuj troviĝas en la lasta grupo, kaj kiu certe estas la plej inda, por tiuj heroj de la sindonemo, por tiuj sentimaj generaloj de nia ideo, ni senĉapeligu nin esprimante al ili nian veran admiron, nian sinceran dankon, nian profundkoran amon!

Dro. Anakreon Stamatiadis.

EL LA GREKA "LINGVO INTERNACIA"

MALPLI KAJ MULTPLI.

EL "LINGVO INTERNACIA"

La blank-maneto
De Henrieto
Estas malgranda, ho mia Di'!
Sed ŝia koro —
Kia doloro! —
Estas malpli.

Ŝiaj ligharoj
Neordinaraj
Estas longegaj, ho mia Di'!
Sed ŝia lango —
Fakto tre stranga! —
Estas multpli.

Ŝia talio,
Die gracia,
Estas malgrâa, ho mia Di'!
Sed la prudento —
Kia turmento!
Estas malpli.

Ŝiaj okuloj
La fajrobrulaj
Estas plennigraj, ho mia Di'!
Sed la animo —
Ha, kia rimo! —
Estas multpli.

Amiko.

LA VOJO.

EL "LINGVO INTERNACIA"

Tra densa mallumo briletas la celo,
Al kiu kuraĝe ni iras.
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras.
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l' sorto, nek mokoj de l' homoj.
Ĉar klara kaj rekta kaj tre difinita
Ĝi estas, la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino kaj la **pacienco.**—
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas, neniam laciĝas,
Pri l' tempoj estontaj pensante.
Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas, —
Ni semas kaj semas konstante.
"Ho, ĉesu!" mokante la homoj admonas, —
"Ne ĉesu, ne ĉesu!" en kor' al ni sonas:
"Obstine antaŭen! La nepoj vin benos,
Se vi' pacience eltenos."

Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkantajn foliojn deširas,
Ni dankas la venton, kaj, repurigitaj,
Ni forton pli freŝan akiras.
Ne mortos jam nia bravega anaro,
Ĝin jam ne timigas la vento, nek staro,
Obstine ĝi paŝas, provita, hardita,
Al cel' unu fojon signita!

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
Ni iru la vojon celitan!
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L' espero, l' obstino kaj la pacienco, —
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

L. Zamenhof.

LA AMO.

De Angel Ruiz Pablo.
EL LA "KATALUNA ANTOLOGIO"

Amo, dolĉa turmento, vundon faras
kaj samtempe kuracas per magio;
ĝi nutras sin per revoj, nostalgio;
kie ĝi vivon vidis, morto staras.
Amo havas eternan floradforton,
mortas de l' frukto, vivas de l'espero;
amo vivas en glora vivlibero
kaj nur en l' ideal' ne trovas morton.
Ne tentu vin am' viva en real',
nek am' vivanta nur en nuna hor',
ĉar amo estas ja nur iluzi'.
Des pli, amo ĝi estos — ju pli for;
ĉar amo, majstr' en ĉia ideal',
vivas nur en fiktiva fantazi'.

BIRDOJ MIGRANTAJ.

El E. Tegnér, glora sveda poeto.
EL "LINGVO INTERNACIA"

Varmege ĉe Nilo bruladas la sun',
La ombro palmara foriĝas jam nun',
La koron ekkaptas enu' je l' patrujo.
Birdar' kolektiĝas. Al Nord'! Al Svedujo!

Profunde sub ni, kvazaŭ en la tombar',
Sur tero verdanta, bluanta sur mar'
Noviĝas malĝojo, ventegas severe,
Sed ni kun la nuboj vojaĝas libere.

Jen alte en montoj, sur verda placet'
Ripozas birdaro, pretiĝas nestet'.
Ni en Akvilono la ovojn metadas,
Sub suno meznokta birdidojn kovadas.

Pafisto forestas en paca la val',
Nimfet' orflugila rapidas al bal'.
Arbara fraŭlino vespere iradas,
Hometoj en montoj la oron forĝadas.

Sed neĝa vintrido revenis al ni
Sur montojn, skuante flugilojn kun kri'.
Leporo blankiĝas, sorpbero ruĝiĝas.
Al Sudo! Al Sudo! Birdar' kolektiĝas.

Al ondoj varmetaj, al verda herbar'
Enu' nin retiras, al ombra palmar'.
Ni tie ripozas post vojo aera,
Ni tie enuas je norda la tero.

Otto Zeidlitz.

EPIGRAMOJ.

EL GOCKINGK.

EL "LINGVO INTERNACIA"

Ke lia dramo estis prosperita,
Ĉi tion Petro sen dubeto kredas.
Li diras: „ĝi ne estis ja fajfita".
Sed kiu fajfas, kiam li oscedas?

A. Kofman.

MONUMENTO.

EL "LINGVO INTERNACIA"

Li, la poeto eminenta,
Patrujon sian gloriginta,
Li vivas nun en monumento,
Estinte pro malsat' mortinta.

A. Kofman.

AUTUNO.

EL "LINGVO INTERNACIA"

L' aŭtuno. Venas nun la pluva plor',
La birdoj sian vintran flugon faras,
Ŝi ankaŭ foren flugis, l' am'-trezor',
Kaj mi malĝoje en la mondo staras.
La birdoj ree venos tien ĉi
Kaj ĝojos gaje sub printempa suno...
Nur ŝi, nur ŝi ne venos pli al mi,
Kaj nur por mi ne ĉesos la aŭtuno!

Amiko.

ĈE LA NOVA JARO.

EL "LINGVO INTERNACIA"

Finiĝis jam por ni malnova jaro
Eterne pasis ĝiaj tagoj for.
Tre bona estis ĝi por la homaro,
Kaj ni ĝin danku el la tuta kor'!

Sonoras adiaŭaj sonoriloj
Solene super land' kaj super mar',
Kaj ekesperas de l' homar' la filoj,
Ĉar venos baldaŭ la estonta jar'.

Malfermas iu pordon. Jen infano
Aperas bela en la ĉambr' al ni,
Portante libron en malgranda mano,
La bona nova jaro estas ĝi.

Sed kio estas de la libr' enhavo?
Felicо aŭ malbono? Diru ĝin!
Benita paco aŭ kruela glavo?
Ĉu venos ĝojo aŭ malĝojo nin?

Ne scias ni kašitan estontecon,
Ĉar restas ĉio en la man' de Di'.
Sed ĉion ajn sendados Li, bonecon
Li donos, kaj kontentaj estu ni.

Otto Zeidlitz.

KANTO.

En mia brust' varmega kaj bolanta
Konservas sin tre multaj sonoj ĉarmaj,
Kaj kiel mi en bela fajra kanto
Elversi ilin volus per la larmoj!
En kanto tiu ĉi eldiri miajn sentojn,
Rakonti kiel am' flamigas mian koron;
En kanto tiu ĉi suferojn kaj turmentojn
Kunigi nur en unu ploron.
Por ke kant' tiu ĉi ektušu aŭdon šian,
La koro šia ankaŭ ekdoloru;
Por ke aŭdante min, — sopiran ploron mian,
Ši ankaŭ tiel same ploru!

EL "LINGVO INTERNACIA" Dm. Jegorov.

ESTAS JAM KAVO EN TER' ELFOSITA

(El la rusa poeto Nikitin)

EL "LINGVO INTERNACIA"

Estas jam kavo en ter' elfosita.
Vivo malgaja kaj vivo ermita!
Ĝi rifuĝejon ne havis turmenta,
Ĝi kiel nokto aŭtuna silenta
Iris laŭ vojo kun granda mizer',
Mortis ĝi kiel en stepo fajrer'.

Mia kruela ekdormu do sorto!
Ĉerka tegmento min kovros kun forto,
Estos ĝi forte de ter' alpremita,
Estos ja nur unu homo prenita...
Kaj al neniu aperos dolor',
Restos li ja en nenies mémor'.

Jen ĝi aŭdiĝas, senzorga la kanto!
Gasto tombeja, fluganta kantanto
Supre sin banas en blua aero,
Sonas arĝente la kant' en libero.
Finu!... Pri l' vivo finiĝis la tem',
Estas bezona nek kanto, nek ĝem'.

Seleznet.

KUZINO, NE FARU KAPRICAN VIZAGON...

Kuzino, ne faru kaprican vizaĝon;
Mi kantus vin, sed mi ne havas kuraĝon.
Mi volis ekkanti la buŝon ravantan,
Sed viaj okuloj tuj mendis la kanton.
Mi volis ekkanti la nigrajn okulojn,
Sed tuj la mentono elmetis postulojn.
Mi volis ekkanti mentonon malgrandan,
Sed la piedetoj nun faras demandon.
Mi volis... por doni al ĉiuj kontenton
Mi havas nek tempon, nek indan talenton,
Kaj vi mem, kuzino, min punus severe,
Se ĉion kantindan mi kantus libere.

EL "LINGVO INTERNACIA" Amiko.

ŠIPETO.

Sur ondoj malvarmaj, sur maro bruanta
Vidiĝas šipeto naĝanta;
Ĝi forte kun maro bolanta batalas:
Konstante leviĝas kaj falas,
Sed tute ne vane širiĝas la velo:
Šipeto rapidas al celo,
Ĝin paca ripozo atendas post veno
En bona, trankvila haveno.

EL "LINGVO INTERNACIA" Seleznet.

TRIOLETO.

Via buŝo, rozvanga fraŭlino,
Kiu brilas ĉarmegon ravantan,
Logas min al kisado senfina, —
Via buŝo, rozvanga fraŭlino.
Sed enhavas dentvicon tranĉantan
Kaj minacas al volo obstina
Via buŝo, rozvanga fraŭlino,
Kiu brilas ĉarmegon ravantan.

EL "LINGVO INTERNACIA" Amiko.

DEFALINTA FOLIO.

De trunketo disigita,
Vi malgaja, sekigita
Kien iras, folieto?
"Vento kverkon ruinadis,
Kiu min sur si tenadis;
Tiam, tute fordonanta
Min al vento forfluganta
Mi trakuras en momento
Valon, monton, kun la vento;
Kaj en tiu ĉi movado
Mi vojaĝos sen timado
Kun folio de la rozo,
Kaj folio de la laŭro
En la tuta vivodaŭro!"

EL "LINGVO INTERNACIA" Trad. Costa e Almeida.

GRANDA SPACO.

(El W. Wackernagel)

Spacon havas ni sen limo
Por konstruoj en aer',
Por amego en animo
Kaj por tombo en la ter'.

EL "LINGVO INTERNACIA" A. Kofman.